

Prezo: 7 €

[www.satesperanto.org](http://www.satesperanto.org)

Septembro-Oktobro 2016 | n-ro 09-10 (1335-1336)



# *Sennaciulo*

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Iam, kiam mi min vere amis

La tagon, kiam mi vere amis min, mi komprenis, ke en ĉiuj cirkonstancoj, mi estis en la konvena loko dum la taŭga momento. Mi povis malstreĉiĝi. Nun mi scias, ke tio estas SI-ESTIMO.

La tagon, kiam mi vere amis min, mi povis percepti, ke mia korpremo kaj mia sufero emocia estas nenio krom signo, ke mi baldaŭ atingos miajn konvinkojn. Nun mi scias, ke tio estas AŬTENTECO.

La tagon, kiam mi vere amis min, mi ĉesis voli vivon alian kaj mi ekkonsciiĝis, ke kio okazas al mi, tio kontribuas al mia persona kresko. Nun mi scias, ke tio estas MATURECO.

La tagon, kiam mi vere amis min, mi ekkomprenis, ke troe estas devigi situacion aŭ personon kun la sola celo havi tion, kion mi volas, sciante, ke ne la persono, nek mi estas pretaj, kaj ke jam ne estas la tempo taŭga. Nun, mi scias, ke tio estas RESPEKTO.

La tagon, kiam mi vere amis min, mi ekliberigis min de tio, kio ne estas bonfara, homoj, situacioj, ĉio, kio malaltigas mian energion. En la komenco mia pensmaniero nomis tion egoismo. Nun, mi scias, ke tio estas SI-AMO.

La tagon, kiam mi vere amis min, mi ĉesis havi malmulte da libera tempo kaj mi ĉesis starigi grandajn planojn, mi forlasis la grandajn projektojn por la estonteco. Nun, mi faras tion, kio estas deca, kion mi ŝatas kaj kiam tio plaĉas al mi kaj je mia ritmo. Nun, mi scias, ke tio estas SIMPLECO.

La tagon, kiam mi vere amis min, mi ĉesis esti ĉiam prava, kaj mi komprenis ĉiujn fojojn, kiam mi eraris. Nun mi malkovris..... HUMILON

La tagon, kiam mi vere amis min, mi ĉesis vivi en la pasinteco kaj nun zorgas pri la estonteco. Hodiaŭ mi vivas la nunon, ponton de ĉiu vivofazo. Nun mi vivas nur unusolan tagon dum unu sola tago. Tio estas PLENECO.

La tagon, kiam mi vere amis min, mi komprenis, ke mia kapo povus erarigi kaj elrevigi min. Sed, se mi disponigas ĝin al mia koro, ĝi fariĝos tre valora alianculo. Tio estas BONEDUKITECO, ĜENTILAJ MANIEROJ.

Ni tute ne timu konfronti nin.

CHARLIE CHAPLIN

Esperantigo de GBEGLO Koffi



Charlie Chaplin kaj Mahatma Gandhi

Jen numero grandparte dediĉita al prikongresaj raportoj. Jam la titolpaĝo ilustras la dumkongresajn interŝanĝojn. La maketo pri bombita Hanovro en 1945 atentigas, ke ne nur la urboj Hiroŝimo, Nagasako kaj Dresdeno estis plene detruitaj de kontraŭnaziaj bomboj, kun ligitaj "akcidentaj" mortigoj de civiluloj. Artikolo pri la situacio en Hungario montras, ke faŝismaj ideoj denove fariĝas influaj en Eŭropo. Sed ilin efike kontraŭbatali eblas nur honeste rigardante ankaŭ al mankoj de la propra tendaro.

Krome aperas kutimaj rubrikoj pri okazaĵoj tra la mondo, interalie sindikataj, pri beletro, pri historiaj aspektoj de la ĝenerala laborista movado kaj pri tiu de SAT mem. Ankaŭ ĉeestas nova kotiztabelo por 2017, kun kelkaj novaĵoj priskribitaj en la kongresa raporto.

Kun ĉi tiu numero estas ekspedita aliĝilo por la 90-a SAT-Kongreso en Gimpo, apud Seulo. Ne maltrafu la eblon unuafoje sperti SAT-kongreson en Azio, en loko kie la asocio havas rimarkindan kernon de tre aktivaj kamaradoj. La lando ĝuste nun travivas grandegan socian movadon, pri kiu certe eblos detale interŝanĝi surloke.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi  
La Redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Sennacieca revuo 2017 : 31a de decembro 2016

Sennaciulo 1-2 (1339-1340) : 20a de decembro

Sennaciulo 3-4 (1341-1342) : 20a de februaro



**Kongresaliĝilo kunsendita**

### TEMDOSIERO: EĤOJ PRI LA 89A SAT-KONGRESO

- 4 La 89-a SAT-kongreso LIBA GABALDA
- 5 Paŝoj al plia tutmondeco VINKO MARKOVO
- 7 Resumo pri kongresaj laborkunsidoj GARY MICKLE KAJ VITO MARKOVO
- 9 Gvidrezolucio de la 89-a SAT-Kongreso en Hercbergo, 2016
- 11 Mondfederismo ROB MOERBEEK
- 12 Kiel ni povas ekscii ion pri la estonteco de nia vivmedio BERT DE WIT
- 13 Best-rajta agado: de cito al decido VITO MARKOVO

### TRA LA MONDO

- 14 Minacas Eŭropon faŝismo en Hungario VS
- 15 "Nia strategio estas eduki la civitanojn je egaleco"
- 16 Blanka malriĉeco
- 17 Parolado far nuntempa Sokrato MIGUEL FERNÁNDEZ

### SINDIKATISMO TUTMONDA

- 18 Egiptio: liberigu la malliberigitajn laboristojn de la ŝipkonstruejo
- 19 Ekvadoro: la registaro minacas malfondi la sindikaton de la instruistoj
- 19 Sindikatoj "modernaj" laŭ la mastrara trabanta gazetararo ROLAND PLATTEAU
- 20 Sud-Koreio: la kampanara aktivulo Baek Nam-gi en komato de pli ol 250 tagoj
- 20 Sindikata letero al la Unua ministro de la franca registaro
- 21 Novaĵoj el la klasbatala fronto PETRO LEVI

### BELETRO

- 21 Iam, kiam mi min vere amis CHARLIE CHAPLIN
- 22 Ĉu homoj fariĝas fiŝoj? ROGER CONDON
- 24 La varma karno de l' vortoj
- 25 Prikultura debato ĜEMIL KSUS

### LABORISTA HISTORIO

- 25 Striko de la rezinistoj ANNE-MARIE BELLENGUEZ
- 27 Josip Vajdliĥ (Weidlich) RADENKO MILOŠEVIĆ
- 28 Lilio Grandière (1920 - 2016)
- 28 Reago al la recenzo *La bunteco de anarkiismo en Hispanio* (1) MIGUEL FERNÁNDEZ

### EKOLOGIO KAJ MEDIPROTEKTADO

- 30 Pri atomruboj ANINO GRIFON

### INTELEKTA MEMDEFENDO

- 31 10 bonaj kialoj por ne iĝi vegano

### SAT-ANOJ AKTIVAS

- 32 Prezento de *Bohemiaj lumoj* en madrida teatro MIGUEL FERNÁNDEZ

### EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 33 Tarifoj 2017
- 34 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Novaj aliĝintoj

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*  
**sennaciulo.redaktejo@gmail.com**

# La 89-a SAT-kongreso

Ĉi-jare la SAT-kongreso okazis en la vilaĝo Sieber, kiu situas meze de Germanio en bela valo ĉirkaŭita de arbaroj de la Harz-montaro. Ĝi apartenas al la urbo Herzberg am Harz – La Esperanto-urbo – kaj distancas de ĝi nur 7 km. Bedaŭrinde tiutempe la rekta vojo estis barita pro laboroj kaj oni devis kromvojaĝi 30 km, kio kaŭzis problemojn al la organizantoj. Dum la semajno okazis laborokunsidoj, prelegoj, debatoj, kunvenis diversaj frakcioj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj.

Ĉiuj manĝoj kaj iuj programeroj okazis en la kongres-hotelo Zum Pass, kiun posedas esperantistoj. Do, la partoprenantoj ĝuis agrablan etoson dum la tuta semajno. Tuj trans la strato estas agrabla verda ĝardeno kun tabloj kaj benkoj por trankvila babilado. Kelkaj samideanoj loĝis en proksima bone ekipita kaj komforta feria domo Haus Diana. La aranĝon partoprenis 90 geesperantistoj el 18 landoj. Sabate dum la konatiga vespero koncertis Ralph Glomp. Li regaligis nin per siaj novaj kantoj.

Dum la dimanĉa inaŭguro la ĉeestantoj de diversaj landaj asocioj kaj kelkaj organizaĵoj salutis la kongreson, inter kiuj ankaŭ IFEF. Estis prezentitaj kelkaj freŝaperintaj libroj. Posttagmeze okazis ekskurso tra la Harz-montaro al la pitoreska urbo Goslar. Impresis nin la impona konstruaĵo Kaiserpfalz, la iama imperiestra palaco kaj belega urbodomo. Ĉi jare la urbo Herzberg am Harz festis dekjaran jubileon de la oficiala alpreno de la kromnomo “La Esperanto-urbo”. Vespere la organiz-

antoj Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar prezentis la Centron de Herzberg, la historion de la urbo, iliajn atingojn kaj aktivajojn dum tiu periodo.

Lunde oni prezentis la jarraportojn kaj debatis pri artikoloj aperintaj en Sennaciulo. Rob Moerbeek parolis pri monda federismo kaj pri nuntempaj sociaj problemoj. Kun Guy Martin ni diskutis la temon de klimat-plivarmiĝo kaj influo de la homo al tiu ĉi fenomeno. Sekvis debato pri kapitalismo. Poste kunvenis poresperanta fako, vegetarana kaj komunista frakcioj. Vespere ni spektis dramon “La kredito” de Jordi Galcerán prezentatan kaj majstre ludatan de Georgo Handzlik kaj Saša Pilipoviĉ.

Marde okazis la tuttaga ekskurso al la urbo Hannover. En la historia urbodomo ni rigardis maketojn de la urbo en diversaj epokoj. Sekvis vizito de la muzeo Aŭgusto Kestner, kiu enhavas kvar malsamajn kolektojn: pri antikva Egiptio, Grek-romia antikvo, numismatiko kaj artmetio. Dum libera posttagmezo ni promenis tra la urbo malkovrante ĝian belecon. Vespere ni ĝuis prezenton de la loka Zibervala folklorgrupo. Aŭdiĝis popolaj kanzonoj, jodlado (kantado sen teksto kun rapida ŝanĝo inter kap- kaj brustvoĉo) kaj vipado laŭ la ritmo de muziko. Ĉe la fino de tiu vespero juna knabo el Ukrainio prezentis siajn tri kantojn gitarludante. Ĉiuj ĝuis tiun ĉi vesperon.

Merkrede matene estis du kunvenoj: unua pri la revuo Sennaciulo kaj pri izolitaj membroj. La dua traktis retejojn kaj eksterajn asociojn neesperantistajn. Posttagmeze Rob Moerbeek parolis pri stilfiguroj kaj s-

ino Gong Xiaofeng (Arko) parolis pri ekologio. Bert de Wit lanĉis interesan temon kaj parolis pri la estonteco de nia vivmedio. Temis pri prognozoj, scenaroj, antaŭjuĝoj, futurologio. Kunsidis LEA-komitato kaj frakcioj de sennaciistoj kaj verduloj. Vespere Peter Kühne prezentis fotojn pri la dua speciala ekskurso en Nepalo, kiun li partoprenis ĉi printempe kaj prezentis projekton pri konstruo de Esperanto-domo en Katmandu por NEspA. La SAT-kongreson partoprenis kvin nepalanoj.

Ĵaŭde matene dum la ĝenerala kunveno estis prezentata financa raporto kaj oni resumis la laboron de la kvar komisionoj. Post la tagmanĝo okazis ekskurso al Herzberg. La urba reprezentanto s-ro Guckel bonvenigis la partoprenantojn en la Welf-kastelo. Sekvis vizito al la urbodomo kaj al la E-centro. En la piedira ĉefstrato troviĝas Esperanto-kafejo kaj ginsenga vendejo. Ĝi estas prizorgata de la esperantista paro Song Jeong-ok (koreino) kaj Harald Schicke (germano). Ankaŭ tiun ĉi lokon pluraj esperantistoj vizitis. Ili estis ege varme akceptitaj kaj regalitaj per bongusta kafo aŭ teo. Vespere koncertis Ĵak Le Puil akompanate per alda klarneto en F de Serĝo Sir'. Poste Hideko Huzimoto prezentis te-ceremonion.

Laŭ la programo vendrede oni ellaboris Deklaracion kaj Rezolucion. La venonta SAT-kongreso okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2017 en Seulo, Suda Koreio, tuj post la 102-a UK.

LIBA GABALDA



Panel-instalo surponte



Kamaradoj el Azio (jp, kr)

89-A KONGRESO DE SAT EN HERCBERGO 2016:

# Paŝoj al plia tutmondeco

Ĉiujare la proponkomisiono estas taskita pri redaktado de gazetartikolo, kiu povu esti tradukita, adaptita kaj sendita al diverslingvaj laboristaj gazetoj kun la kongresa deklaro. Komplementoj, korektoj kaj sugestoj pri la ĉi-suba propono plu estas bonvenaj, same kiel informoj pri reagoj levitaj de ĝia dissendado.

La ŝoseo senpere liganta Herbergon kun la vilaĝo Zibero (Sieber), okazejo de la 89-a Kongreso de SAT inter 2016-07-16 kaj 2016-07-23, estis fermita pro urĝaj rekonstruaj laboroj. Multe pli longa, ĉ. 30-kilometra ĉirkaŭvojo kondukis tien serpentume tra la densaj arbaroj de la Harca montaro (suda Malsupra Saksio, norde de Gotingeno). Veturigado de kongresanoj inter Zibero kaj Herbergo estis improvizita, iom komplikita, sed feliĉe ĝi iel-tiel funkciis. Harco estas la plej montara regiono en la norda duono de Germanio, turisme populara. Spuroj de la mezepoke kaj ankaŭ poste floranta minado, kiu elterigis precipe arĝenton, plumbon kaj zinkon, diversloke videblas.

Por ke asocio estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia. La SAT-anoj estis ĝis nun distribuitaj tra la mondo kiel la ne SAT-aj samlingvanoj: geografie neekvilibre, eŭropcentre. Ĉi-foje okazis kvalita salto rilate diverskontinentecon de la partoprenantaro, kiel decas por asocio nomanta sin "tutmonda": el Nepalo, Koreio, Ĉinio, Japanio po pluraj, po unu el Senegalio, Malagasio, Aŭstralio. Entute aliĝis 85 homoj el 21 landoj. Jam delonge viglas SAT-vivo en Suda Koreio, kaj tial estis senkontesta la decido okazigi laŭ ilia propono la venontan SAT-kongreson en Seulo. Ĝi estos la unua en Azio.

Traktitaj dum la laborkunsidoj estis kutimaj administrajtoj pri agadraporto, financoj, membraro. Kaŭzis viglan diskuton, ke en la asocia revuo, Sennaciulo, aperis dum la jaro artikoloj kun tikla enhavo. Tio estis okazo por reemfazi, ke SAT, kvankam kun klara radikale maldekstra orientiĝo, havas tre malferman supertendencan funkciadon, kiu ebligas, ke ĉiuj anoj (kaj ankaŭ nemembroj, kadre de la revuo) povas esprimi proprajn opiniojn kaj prezenti



siajn argumentojn sen timi pri cenzurado pro "politika nekorekteco". Tamen restas iom da disopinio: iuj pledas por praktike senrestrikta esprimrajto, dum aliaj substrekas, ke la ekzistanta jam larĝa esprimlibereco havas limojn, kiujn fiksis la ĝenerala sennaciece proletesperantista kadro de la statuto. Tiu temo estis pludebatita dum laborgrupoj, kiuj pritraktis ankaŭ evoluigon de la retejo, kontaktotenadon kun senperantaj membroj kaj rilatadon kun fratassocio (esperantistaj aŭ ne).

Prezentis novan dramon – La kredito de Jordi Galcerán en traduko de Georgo Handzlik – Georgo



Mukunda, el Nepalo



3a laborkunsido



**Koncerto de Ĵak Lepüil', akompanata de Serĝo Sir'**

Handzlik kaj Saša Pilipovic (teatro Verda Banano): vivece aktoratan, amuzan de la komenco ĝis la fino.

Distraj estis ankaŭ tri muzikaj vesperoj (krom improvizitaj kantoludadoj kelkope kaj eksterprograme iniciate de kongresanoj). Unu germanlingva kun folkloro grupo el la vilaĝo mem, La Zibervalanoj, kun menciinde impresa jodlistino kaj fine interpretado far studanto el Ukrainio de propraj komponaĵoj. Du esperantlingvaj, unu la unuan vesperon kun Ralf' Glomp', sed kiu tute ne ebligis interkonatiĝon, kvankam ĝi estis ĉi-pretende anoncita. Dua estis kant-recitalo de Ĵak' Lepüil' kun akompanado klarneta de Serĝo Sir', kiu ebligis reaŭdi multajn klasikaĵojn, inter kiuj kelkajn engaĝitajn kanzonojn el franca kaj italia repertuaroj.

El kultura flanko, la kongreso ebligis pere de sia libroservo akiri multajn librojn, T-ĉemizojn kaj aliajn varojn (kiel la DVD pri Esperanto-movado, spektebla laŭ 22 malsamaj lingvoj), kaj ankaŭ malkovri novaĵojn ĉijare eldonitajn de la eldonkooperativo, kiel originala bildstrio, *La Rejnoro* laŭ

Rikardo Vagnero, kreita de Serĝo Sir' el fidela traduko de Georgo Lagranĵ'.

La lasta vespero estis kongresana partopreniga vespero, kantvespero plus aŭkcio.

Bedaŭrinde forsaltis planita spektigo de filmo pri astronomio pro longa prezento, kvankam interesa, pri sperto en Nepalo... sed far kongresano el Germanio, dum estintus pli trafe aŭdi rekte el la buŝo de ĉeestantaj nepalanoj mem.

Inter la organizaj fuŝetoj (pri kunsid-salonoj estis ofte problemoj de multfojaj translokiĝoj) aparte edifa estis tio, ke plejmulto el prezentantoj de kongresaj kontribuoj eĉ ne sciis ĝis sia alveno surloke pri enprogramigo de propra propono, kaj ke korea kamarado, pentristo, devis rezigni unu el siaj (pri portretado de Zamĉjo), ĉar ambaŭ liaj prezentoj estis programitaj samtempe. Aliflanke, la prezento de alia kongresano estis programita dufoje dum la semajno (el kiuj unu kiam la prezentanto ankoraŭ ne ĉeestis...)! Tuttaga ekskurso kondukis al Hanovro, la ĉefurbo de Malsupra

Saksio. Duontaga ekskurso al Herbergo komenciĝis en la kastelo de la velfoj, kaj kondukis plu, por multaj tre memorinde, al vidindaĵoj specifaj de la "Esperanto-urbo". Ne povas ne imponi, ke vizitanto en Herbergo nepre altrafas ĉie Esperanto-rilatajn ŝildojn jam okaze de simpla promenado en la urbo.

Kunsidis pluraj SAT-frakcioj. La kunvenon de la Vegetara Frakcio partoprenis kaj frakcianoj kaj scivoluloj. Aŭdiĝis dum la diskuto tuta gamo de motivoj por vegani (etikaj, ekologiaj, sanrilataj), vegetari kaj ĉiomangadi (kutimoj de familianoj kaj la tuta socia ĉirkaŭantaro, malcerto pri la sanefikoj de vegana manĝmaniero). Montriĝas, ke esperantistoj kaj aparte SAT-anoj estas "fruadoptantoj" de la nun ĉie disvastiĝanta vegana vivmaniero.

Rob Moerbeek prelegis antaŭ granda grupo pri mondfederismo: koncepto neidentata, sed ideo paralela al la en SAT disvastigita sennaciismo de kelkaj, kaj la malnaciemo de la tuta asocio. Ĉiam multnombro partoprenis esperantistoj en ĉi tiu movado,



**Dum ekskurso al Hanovro**



**Pri ekologio en Ĉinio. Parolas Bruno (Henry).**



**Cumpaso (Hotelo Zum Pass)**

interalie pere de la Universala Ligo fondita en 1942. Similsence agadas la movado de Mondcivitanoj (ankaŭ kun parte esperantista membraro).

Multaj prelego-debatoj rekte-nerekte tuŝis nun neeskapeblan temon: ekologiismon/medi-protektadon. Gi' Marteno (Guy Martin) pri Klimat-ŝanĝo kaj kapitalismo kun atentigo pri temposkaloj rilate rapidecon de la ŝanĝoj en la lastaj du jarcentoj kompare kun antaŭaj samgrandaj ŝanĝoj disvolviĝintaj dum pluraj jarmiloj. Arko parolis pri ekologiaj sekvoj de la multiĝo de trafiko en Ĉinio kaj la agado de la ŝtato por plibonigi la aerkvaliton. Bert' de Vit' (de Wit) pri eblaj scenaroj por verda estonto (ekologie sed ankaŭ esperantomovade) kaj kiel antaŭvidi kaj agadi taŭge fronte al diversaj tendencrompoj. Andreas' Langholf pri Unu mondo kaj justa komerco kun gustumigo de "juste" etikeditaj kafo, sukaj kaj ĉokolado. Prelego-debato de Vito Markovo pri bestaj rajtoj vekis disopiniecon – ne mirinde ĉe koncepto, kiu eĉ ĉe maldekstruloj ne jam apartenas al la komuna ideostoko. Laŭprograme devus esti prezento pri eko-vilaĝoj, sed ankaŭ ĝi fakte ne okazis.

En la programeroj iel rilataj al ekologio indas mencii frakciajn kunsidojn de la Vegetara Sekcio kaj Verduloj, kaj la prelego-debaton pri bestaj rajtoj, kiu diskutigis la homan rolon en "(mis)regulado" de populacioj (ne nur pri sovaĝbestoj, sed ankaŭ pri miliardoj da individuoj bredataj por homa konsumado).

La multeco de temoj ektuŝitaj en la kunvenoj kaj prelegoj respeguliĝas en la kongresa Deklaracio, en kiu du ĉefaj emfazoj konstateblas: la ekologia damaĝo, notinde la klimata ŝanĝiĝo, sekvanta el la kapitalisma kreskismo, kaj la neceso respekti la rajton de migrantoj kaj rifuĝantoj cirkuli kie ajn en la mondo libere.

Tre taŭga montriĝis la hotelo, kie okazis plejmulto de la kongreso. Nekutime komforte estis havi eblon senpere rilati kun hotelestro, kiu mem estas esperantisto.

GARY MICKLE KAJ VITO MARKOVO

# Resumo pri kongresaj laborkunsidoj

## Malfermo

Post salutoj de la PK, de UEA, IFEF, SAT en Japanio, SAT en Koreio, Radio 3zzz, kaj de la OKK, elektiĝis la jenaj kongresaj funkciuloj:

- Kunvenprezidantoj: Guy Martin, Vito Markovo kaj Arturo Prent
- Voĉdonkomisiono: Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale
- Proponkomisiono: Lucette Echappé, Gijermo Fians, Dominik Schramm

## Unua laborkunsido

Post transdono de salutoj de Mirejo Grosjean nome de ILEI kaj de Djémil Kessous propranome, la kunveno estis dediĉita al traktado de la jarraporto de la PK.

Estis memorigite, ke la PK konsistas nun el sep homoj: Guy Cavalier, Bruno Henry, Franjo Lévêque, Vinko Markovo, Diana Riŝar, Pedro Sanz, Dominiko Simeone. Ŝtonĉjo (Pierre Soubourou) demisiis pro konstato pri neeblo partopreni la kunvenojn. Post voko al pliaj helpantoj pere de Sennaciulo, aldoniĝas Amparado Cisnero, kiu de januaro helpas kaj partoprenas en la interŝanĝoj de la PK, sed sen voĉdonrajto.

La sidejo utilas ne nur por stokado de fermitaj libropakoj, sed ankaŭ de arkivoj, kiuj bezonas esti facile konsulteblaj kaze de bezono, kaj do kuŝas pli malpli ordigite sur bretoj kaj ŝrankoj. Eblas kontakti kun Guy Cavalier por aliri tiujn dokumentojn.

La venonta adresaro entenos prononc-indikojn kaj proponojn pri esperantigo de ĉiuj loĝurboj. Pri ilia oportuneco decidis la uzantoj. Utilus por la estonteco havi indikojn pri

proksimeco inter urbetoj kaj pli konataj urbejoj.

Pri LEA-oj, SAT-Amikaro travivis tre malfacilajn jarojn. Dum du sinsekvaj jaroj ne okazis veraj kongresoj, sed membrokunsidoj unutage en Grezijono. Nun restas 250 membroj, sed malmultaj homfortoj. Okazis ioma reaktiviĝo post konsulto de la membraro pri la estonteco de la asocio. Nun reaperas iom pli ofte la revuo. En Pasko 2017 estas planita kongreso apud Nanto.

Pri membrokotizoj, estis petite, ke pagoj por alia membro ne estu enkalkulitaj ene de solidarkaso.

Plej viglajn reagojn vekis la publikigo en Sennaciulo 3-4 de la artikolo de Roger Condon titolita "Zamenhof pravis". Malgraŭ atentigo, ke jam en la redaktangulo aperis instigo al debatado, pri tiu ĉi artikolo kaj la tuj posta, defendanta plej kontraŭan vidpunkton, pluraj kamaradoj opiniis ke la redaktoskipo iel devus pli klare interveni pri la enhavo de tiklaj kontribuoj.

Pri EFK, la preparo de libro pri unuamondmilito prokrastiĝis ĉar la plano komence estis publikigi ion en 1914. Nun la plano estas havi ion eldonitan por 1919 maksimume. Rikardo Schneller kaj Kani klopodis kolekti materialojn el diversaj landoj. Nun plu mankas ĉefe materialo pri Rusio kaj Balkanio. Venis eĉ kontribuo el Aŭstralio. Diverslongaj tekstoj taŭgas por tiu ĉi projekto. La kunordigantoj kolektis ankaŭ memoraĵojn de plejaĝaj kamaradoj kiuj rekte aŭdis iujn travivaĵojn de familianoj. Rilate administradon de EFK, Flora Markovo de unu jaro prizorgas la fakturadon, en rilato kun Veroniko Girard.

La agadraporto estis akceptita kun 33 poraj voĉoj kaj 2 sindetenoj.

## Dua laborkunsido

La partoprenantoj dispartiĝis ene de kvar laborgrupoj. Unue, okazis paralele diskutoj pri Sennaciulo kaj pri kontaktoj kun izolitaj membroj, kaj poste pri SAT-retejo kaj pri kontaktoj kun fratorganizoj.

## Tria laborkunsido

Pri la raporto de la ĜK-aro kaj KK, estis precizigite ke la ĜK-oj foje komentas ĝin kaj eventuale petas klarigojn pri iuj punktoj. La raporto estis akceptita kun 3 sindetenoj kaj 26 poraj voĉoj.

La financa raporto (presita en Sulo 7-8) estis papere disdonita al la ĉeestantoj, kun la akompanaj klarigoj. La kontoj estis dumkongrese kontrolitaj de Gary Mickle, Jacqueline Poux kaj Bert de Wit, kiuj ne rimarkis nenormalaĵojn. La PK planas malfermi novan ŝparkonton ĉe la NEF (pli etika banko). Ankaŭ necesos provizi monon por la reeldono de PIV, por kiu ankaŭ necesos serĉi respondecan redaktoron pri la komunlingva parto, anstataŭe al la forpasinta Michel Duc Goninaz. La raporto estis akceptita kun 7 sindetenoj kaj 28 voĉoj por.

Estis prezentita nova kotiztabelo, kiu klopodas rekoherigi la nivelon de kotizoj inter diversaj landoj, kaj enkondukas eblecon nur rete aboni Sennaciulon. La tuta prezosistemo baziĝas sur 4-eŭraj ŝtupoj por faciligi kalkuladon de rabatoj. Se la sistemo funkcios kontentige, pliaj reĝustigoj povos okazi post du jaroj. La nova tabelo estis akceptita kun 6 sindetenoj kaj 28 poraj voĉoj.

Pri la konflikt-komisiono, Sergo Sir' dum la kunveno prezentis sian kandidatigon, aŭdinte ke la komisiono bezonas renovigon. Telefona konsultado de la du neĉeestantaj kandidatoj, Vincento Charlot kaj Petro Levi, montris ke neniu el ili pretas rekandidati ekster la kadro de la antaŭe interkonsentita triopo. Sekve Sergo Sir' rezignis pri kandidatigo. La rekandidatigo de la triopo konsistanta el Vincento Charlot, Kani kaj Petro Levi estis akceptita kun 13 poraj voĉoj, 15 sindetenoj kaj 5 kontraŭaj voĉoj.

Sekvis resumo pri la diskutoj dum la kvar laborgrupoj.

Pri Sennaciulo, la diskuto fokusiĝis pri la maniero trakti la tiklajn kontribuojn, kiuj lastatempe koncernis plurajn malsamajn temojn (Israelo, nudaj korpoj, papo, Venezuelo, bankokontoj por armilaĉetado...). Pli da komunikado pri tiuj tiklaĵoj inter la kunordigantoj kaj la ceteraj redaktoskipanoj povus helpi al plia reliefigo de la aferoj, kiuj aparte indas esti debatitaj.

Pri kontaktoj kun izolitaj membroj (t.e. SAT-anoj en lando sen peranto), Veronik' Girard kaj Anne-Marie Leprévost konsentis prizorgi la peradon de kotizpagoj.

Pri SAT-retejo, duono de la ĉeestantoj jam vizitis ĝin aŭ enmetis artikolojn. Estis resubstrekitaj la neceso havi lerno-rondon pri ĝia funkciado dum la kongreso. Dum la venontaj monatoj devus okazi sufiĉe grava ĝisdatigo de la mastrum-programo, sen konsekvenco al la maniero enmeti artikolojn. La plej grava konstatita manko en la nuna sistemo estas la manko de funkcia interna serĉ-motoro.

Pri kontaktoj kun fratorganizoj, ĉefe estis donitaj ekzemploj el la agado de

SATeH, en kontakto kun hispanlingvaj eldonejoj, pri kunproduktado de libroj. Ankaŭ estis substrekitaj la graveco de retejoj kiel "Labourstart" por la interŝanĝo de sindikataj novaĵoj. Ne sencas ke SAT proponu tujan uzon de Esperanto al internaciaj laboristaj organizoj, sed eblas antaŭeniri per plua tradukado kaj disvastigo de informoj, kaj per starigo de eksperimentaj laborgrupoj pri lingvo-uzado.

Post aŭskulto de pliaj klarigoj pri praktikaj aspektoj, la kongresanoj akceptis per 33 poraj voĉoj kaj 3 sindetenoj la proponon kongresi en Seulo, Koreio, en 2017. La peto, ke la PK laŭeble klopodu eviti kolizion de datoj kun IJK estas akceptita kun aplaŭdoj.

## Kvara laborkunsido

Transdoniĝis salutoj de k-doj Hans Rodewig kaj Hans Jankowski.

La kunveno utilis por trakto de la gvidrezolucio kaj deklaro (vd p. 10). Pri ĉiuj punktoj en la gvidrezolucio eblis atingi interkonsenton pri revortigoj sen voĉdonado. Rilate praktikajn dumkongresajn okazaĵojn la PK faris la apartan deklaron (vidu apude). La fina teksto estis akceptita kun 31 poraj voĉoj kaj 4 sindetenoj. Same, la deklaro estis akceptita kun du sindetenoj kaj 28 poraj voĉoj.

La kongreso fermiĝis kun danko al la OKK, al la kongresaj funkciuloj kaj al ĉiuj partoprenantoj.

*Protokolis Vinko Markovo*

## Komuniko de la PK pri kongresorganizado

La PK de SAT konstatis kaj bedaŭras surlokajn praktikajn problemojn, kaj klopodos organiziĝi por pli efike helpi al la OKK-oj por solvi malfacilaĵojn, kiuj eventuale povos aperi dum la organizado de venontaj kongresoj.

*En Herbergo, la 22an de julio 2017.*



# Gvidrezolucio de la 89-a SAT-Kongreso en Hercbergo, 2016

La 89-a Kongreso de SAT okazis en Sieber en *Herzberg am Harz*, Germanio, de la 16-a ĝis la 23-a de Julio de 2016.

## Gvidrezolucio

### Pri kongresoj

La SAT-Kongreso

- akceptis kiel kongresurbon de 2017 Seulon en Koreio kaj sugestas, ke la Plenum-Komitato (PK) kaj antaŭaj Organizaj Kongresaj Komitatoj (OKK) konsilu la venontan OKK-on pri la organizado (laŭ la peto de tiu ĉi),
- konstatas, ke por la sekvantaj kongresoj post 2017 daŭre ekzistas du eblecoj: kongreso en Kragujevac', Serbio, en 2018, kaj kongreso en Leŝefoŝ', Svedio, en 2019, kvankam ambaŭ ankoraŭ ne estas konfirmitaj ;
- konsilas al la venonta OKK, konsulte kun la PK, elekti malferman kongrestemon, ne specife fokusitan al Koreio (ekzemple « mondo sen limoj » aŭ « laborista vivo en nuna epoko » ktp.),
- petas al la PK, informi laŭ kiuj kriterioj oni atribuu help-monon por kongresi,
- petas de la PK, precizigi aŭ aldoni al la regularo pri kongresoj detalojn elprenitajn de pasintaj ĝeneralaj komentoj pri la organizado,
- petas, ke la PK daŭre kaj firme rilatu kun la OKK por helpi al la plenumo de la regularo por garantii konvenajn disvolvondiĉojn por la kongreso,
- notas kaj aprobas, ke la PK konstatis kaj bedaŭras surlokajn praktikajn problemojn, kaj klopodos organiziĝi por pli efike helpi al la OKK-oj por solvi malfacilaĵojn, kiuj eventuale povos aperi dum la organizado de venontaj kongresoj,
- proponas, ke laŭeble la dato de la SAT-kongreso kongruu kun tiu de la Internacia Junulara Kongreso (IJK), por ankaŭ doni eblecon al junuloj partopreni en la SAT-kongreso,
- sugestas, ke dum ĉiu kongreso estu ebleco praktike refreŝigi la konojn de la kongresanoj pri la uzo kaj ĝisdatigo de la retejo,
- esperas, ke realigeblas kursoj de Esperanto dum venontaj kongresoj,
- instigas la anaron kiel eble plej frue aliĝi al la Seula kongreso okazonta de la 29-a de Julio ĝis la 5-a de Aŭgusto 2017,
- petas de la PK prepari la voĉdonajn kunvenojn tiel, ke la volo (re)kandidatiĝi aŭ ne de la neĉeestantoj estu tute klara.

### Pri la SAT-retejo

La SAT-kongreso

- instigas la mastrumantojn, fari la retpaĝon (precipe la serĉofunkcion) pli uzebla, ordigi ĝin kaj precizigi la statistikon,
- kuraĝigas ĉiujn membrojn, nutri aŭ nutrigi la retejon per aktualaj informoj kaj fotoj (ekz. pri kongresoj),
- petas la membraron enmeti en la retejon pli da materialo en aliaj lingvoj por kuraĝigi homojn, kiuj ankoraŭ ne parolas Esperanton, lerni ĝin por povi membriĝi en la asocio,
- invitas la membraron zorgi, ke la retejo estu pli uzata.

## Pri aliaj taskoj

La SAT-kongreso

- dankas al la du SAT-anoj pretaj esti novaj perantoj por « senperantaj membroj »,
- memorigas pri la bezono de nova peranto por Nederlando kaj Serbio (eventuale ankaŭ por Germanio),
- kuraĝigas la PK-on, la perantojn kaj la membrojn plej bone interrilati kaj plej aktive partopreni en la asocio,
- bonvenigas novajn kandidatiĝojn al PK kaj sugestas la oficialan kandidatiĝon de Amparado Cisnero,
- alvokas la PK-on decidi pri la uzo de la sidejo, ĉu plu teni ĝin aŭ transloki ĝin al malpli multekosta loko,
- sugestas, ke farotaj laboroj estu publike anoncitur pere de Sennaciulo al ĉiuj membroj por kandidatiĝi prefere membrojn antaŭ ol kontaktiĝi kun ekster-SAT-aj profesiuloj, por zorgi, ke laboroj estu faritaj kun pli da engaĝiĝo,
- bonvenigas la proponon plibonigi kaj ĝisdatigi la Adresaron per la ĝustigo de loknomoj, per la aldono de prononcindiko en la loka lingvo, per la aldono (eble aparte) de la plej proksima granda urbo, kaj eble per la aldono de la Esperanta formo de la loknomo,
- instigas la membrojn de SAT pensi, kiel engaĝi en SAT novajn lernantojn de Esperanto per Duolingo kaj aliaj retejoj,
- alvokas SAT-anojn alproksimigi SAT-on al la sindikatoj kaj al la laboristoj, por ke SAT povu informi pri iliaj luktoj kaj interesoj kaj reciproke,
- konstatas malkonsenton pri kelkaj kontribuoj al la revuo Sennaciulo, kio estigas la demandon, ĉu cenzuri aŭ atentigi pri eble polemika artikolo kaj pri la nura respondeco de la aŭtoro mem. Pri tio, oni povas aŭ akcepti nur artikolojn laŭ la celoj de SAT aŭ anstataŭ cenzuri kontribuon instigi debatojn, rebatojn kaj malsimilajn opiniojn apud la artikoloj.
- salutas laboron de la Eldona Fako Kooperativa (EFK ; aperigo de « La Rejnoro » kaj « La progresema Esperantomovado en perspektivo ») kaj instigas anojn kontribui pri preparataj eldonaĵoj, notinde la libron pri la unua mondmilito,
- instigas la EFK-on daŭrigi la eldonadon de elektronikaj versioj de libroj kaj informi pri tio en Sennaciulo.

## Deklaracio

La 89-a SAT-kongreso okazinta en Hercbergo ĉe Harco (Germanio) de la 16-a ĝis la 23-a de Julio de 2016

- kontraŭas la militojn kaj denuncas la atencojn ĉie en la mondo,
- maltrankviliĝas pri tiom da senlaboruloj kaj laboristoj kun rubokontraktoj, eĉ en landoj laŭdire evoluigintaj, kaj konscias pri la suferoj kaŭzigitaj de la rezultanta malsufiĉo de la salajro,
- tre bedaŭras kreskon de naciismaj partioj kaj movadoj en multaj landoj,
- kritikas la plejparte trankviligan reagon de la Eŭropaj registaroj al la sendemokratiigaj agoj de pluraj ŝtatoj, aparte de la Turka,
- kondamnas la komplicecon de multlandaj firmaoj kaj interesataj registaroj en la fakta forrabo de raraj resursoj, kio kontribuas al internaj kaj internaciaj armitaj konfliktoj en Afriko, Mezoriento kaj Sudameriko,
- kulpigas la koncernatajn registarojn pro livero de armiloj al militantaj landoj en Mezoriento, Afriko kaj ĉie tra la mondo,
- emfazas la postulon de SAT bonvenigi enmigrintojn kaj rifuĝintojn kaj respekti la rajton de homoj cirkuli kie ajn, konsciante ke la multaj militoj kaj malbonaj vivkondiĉoj en kelkaj lokoj de la mondo malebligas la vivon en tiuj lokoj,
- kontestas la distingon ofte voĉitan de politikistoj kaj gazetaro inter bonaj militrifuĝintoj kaj malbonaj bonvivemuloj, kiuj laŭ ili nur venas al la riĉaj landoj por ĝui laŭdire nemerititan agrablan vivon,
- subtenas la ideon, ke homaj rajtoj kaj tutmondaj agadoj ne estas limigitaj de landlimoj kaj ke homoj rajtas kaj devas unuiĝi por defendi similajn vidpunktojn kaj kune lukti kaj agadi,
- reemfazas sian zorgemon rilate urĝecon de la ekologia situacio, ligita kun klimataj perturboj rezultantaj grandparte de homa agado kadre de kapitalisma kreskismo, kaj alvokas al konsiderado kaj ekutiligo de alternativoj, ĉu laŭ individua, ĉu laŭ kolektiva povo, kaj sur loka, kaj sur monda skaloj,
- atentigas pri la fandiĝo de la glaĉeroj en multaj regionoj kaj la endanĝerigo de multaj vivoj,
- rimarkas, ke troa kaj ekologi damaĝa transportado estas kaŭzata ne nur de malbona planado kaj konsumado, sed ankaŭ pro uzo de malaltpagataj laboristoj en foraj lokoj,
- malakceptas la venenadon kaj la minacon per atomenergio kaj atomaj armiloj sur nia tuta planedo,
- subtenas plivastigon de vera « justa komerco », kiam ekologia kaj « justa » produktado ne eblas surloke.

# Mondfederismo

Resumo de prelego far Rob Moerbeek dum la SAT-Kongreso en Sieber



Rob Moerbeek (bildo de Serĝo Sir')

En la Jarlibro de UEA troviĝas mencio de la kunlaboraj Mondcivitanoj (mondcivitana pasporto valoras ideo) kaj unu delegito pri Mondfederismo: prof. Ronald Glossop (Usono), kies verkon *Mondfederismo*? tradukis John Rapley.

Tuj post la Dua Mondmilito furoris anglalingva libro de Amery Reves, *Anatomio de la paco*, en kiu li montris, ke homoj ĉiam interbatalis, ĝis la klanajn intermurdojn finis unuiĝo sub triboj, la tribajn militojn ĉesigis nacioj kaj fine restis ŝtatoj, kies intermilitadon limigis aliancoj. Post ĉiam pli teknikaj amasmurdadoj, eĉ du mondmilitoj, jam urĝas tutmonda regoformo. Reves pledas por monda federacio (aŭ konfederacio: kun maksimumo da decidpovo por la malsupraj tavoloj), en kiu la mondajn problemojn kiel malriĉon, malsaton, malsanojn, militojn... solvu monda aŭtoritato. Necesas do, ke ŝtatoj cedu al ĝi parton de sia suvereneco.

Post pletoj kaj provoj ekde komence de la 20a jarcento, en 1946 ekestis WFM, World Federalist Movement – fakte tiunome nur de 1956 – kies membraro en la 1950-aj jaroj, en dekoj da landaj sekcioj, atingis 400 000, poste refalis al dekonio.

Mondfeder(al)ismo celas realigi vivan mondan demokration, kun *subsidiara* decidpovo, t.e. plejeble baza, t.e. loka, se tio sufiĉas, sed regiona aŭ landa, eĉ kontinenta laŭ la amplekso de la problemoj: laŭ *sociokratia* modelo nur pri mondaj problemoj decida monda estraro, demokratie elektita kaj kontrolata (de rekte elektita monda parlamento). Decidojn oni faru interkonsente kaj per leĝoj. Necesas trovi ekvilibron inter libereco kaj reguligo de la socio. Esenca estas la observado de la homaj rajtoj (Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: 1948) kaj demokratiaj principoj.

Federisme devas agi personoj kaj grupoj, kiuj tutmonde kontaktu por realigi komunajn celojn. Necesas interalie evoluigi vizion por instruado (sen endoktrinigo!), organizado kaj kunlaborado, ankaŭ por ĝusta, justa aranĝo de la socio.

Komence oni malakceptis la senpovan UN, sed nuntempe oni opinias ĝin bazo por plukonstruo de ankoraŭ rudimenta demokratio

En la ĉiujara kongreso multaj delegitoj traktas aktualajn mondo-problemojn: ekz. en Japanio pri internacia UN-polico, transprenonta la funkcion de armeoj post tutmonda malarmado. (Pro eseo pri tia polica forto la esperantistino Akiko Nagata siatempe estis premiita.)

Dank' al parolado de Andreo Cseh en Esperanto, jam plejparte kompren-ebla kaj kun brila traduko de Julia Isbrücker, kun kontribuo de Sigismundo Pragano, sukcesis propono agnoski Esperanton kiel duan internacian lingvon apud la angla.

En la nederlanda sekcio, WFBN, Monda Federalisma Movado en Nederlando, ni havas apartan labor-grupon "Monda Jura Ordo" por diskuti gravajn krimojn kaj aliajn misojn. Letero al la ministerio de eksteraj aferoj alvokis atentigi la israelan kolegon pri gravaj lezoj kontraŭ la homaj rajtoj de palestinanoj, inkluzive maltroan provizon per trinkakvo, la dua vivbezono!

Mi subskribis, indigna pri la primitivaj barbaraĵoj, sed aldonis, ke ankaŭ nederlandanoj nepageble ŝuldas al Indonezio pro 350-jara kolonia murda ekspluatado kaj post la Dua Mondmilito pro duonmiliono da viktimoj de la du *policaĵ intervenoj*. Mallaŭdinda estas nia registaro, kiu rifuzis tri milionojn da eŭroj al tri institucioj por ankoraŭ ebla objektiva esplorado, kunlabore kun indoneziaj

kolegoj, pri niaj militkrimoj en Indonezio.

Militoj klare rilatas populacian premon: necesas sentabuigi la temon. Ni respektu la teron kaj niajn posteulojn.

Pri tio raportas la organo *Unu mondo* (nederlandlingva, sed kun kelkaj artikoloj paralele ankaŭ en Esperanto. Kontribuas krome esperantisto el Lejdeno: Jan Willem van Leenhoff.) Kaj Esperanto-kurso startis post enkonduko pri la monda lingvoproblemo prezentita de mag. Hans Erasmus. Ravite de la Roterdama UK (2008), la prezidanto de WFBN Frans Vermeulen almenaŭ pasive kaj skribe lernis la lingvon. Alia membro, la juna oceanografo Marko Van Hulsten mem prezentis en Esperanto la resumon pri sia disertacio pri la spurelementoj Mg kaj Al. (Simile la talenta Duolingo-studento Daan van Goppel Esperante resumis sian disertacion pri Barat-Papuo, en kiu li alvokas nederlandajn entreprenistojn kapabligi la indiĝenojn utiligi siajn resursojn, nun ekspluatatajn nur de pli kleraj indonezianoj.)

Mi foje uzas *Sennaciulo* en la kurso pri Esperanto: multon ni havas komunan, interalie la malakcepton de trudkontraktoj kiel TTIP.

ROB MOERBEEK

# Kiel ni povas ekscii ion pri la estonteco de nia vivmedio

Resumo de prelego far Bert de Wit dum la SAT-Kongreso en Sieber

Homoj ĉiam volas ion scii pri la estonteco. En antaŭaj tempoj per klarviduloj, profetoj, orakoloj. Ankaŭ per horoskopoj oni provas imagi la estontecon, ofte per eldiroj sufiĉe elastaj.

Futurologio estas pli-malpli scienco pri tio, kiel oni povas krei imagojn pri eblaj estontecoj. Ofte nuntempe la imagoj estas bazitaj sur scenaroj, kiuj estas kredeblaj rakontoj pri imagita estonteco.

En la pasinteco iuj “futurologoj” faris gravan eraron pensante ke la tendencoj en la socio, ekz. pri naskokvanto, estos rektliniaj kaj supreniros. Tiel Paul Ehrlich en la 1960-aj jaroj profetis ke Hindio ne plu ekzistos post la jaro 2000 kaj ke en Usono pli ol 65 milionoj da homoj malsatos tiam. La prognozaj pri la nombro da loĝantoj en diversaj okcidentaj landoj estis en la sesdekaj jaroj tro altaj, ĉar la “pilolo” kaŭzis tendencrompon.

La estonteco estas nedeterminita, sed tio ne signifas ke ĝi estas malplena. Scenaroj estas ofte bazitaj sur du aksoj kiuj reprezentas la tendencojn en la ĉirkaŭa socio pri kiuj oni pensas ke ili plej grave influas kaj estas plej necertaj. Ekz. scenaroj bazitaj sur tutmondiĝo unuflanke kaj regionigi aliflanke, kaj individuismo kontraŭ kunlaborado.

Sed scenaroj povas ankaŭ esti bazitaj sur la profundaj konvinkoj de homoj pri ekz. tio, kio estas naturo. Se oni pensas ke plej granda biodiverseco estu la celo de naturprotektado, oni elektas tute alian estontecon ol kiam oni pensas ke naturo servu al la homaro per ekz. distraj ebloj aŭ naturaj purigaj procezoj. Tiel en Nederlando aperis studo kun kvar naturscenaroj kiujn oni povas utiligi por pripensi naturpolitikon en diversaj regionoj de la lando. Oni per scenaroj



Bert de Wit (bildo de Sergio Sir')

povas fari prognozojn pri la nombro da loĝantoj en certaj regionoj de iu lando kaj adapti se necese la planojn.

Oni uzas scenarojn ne nur por strategia planado, kiel faras ekz. la kompanio Shell, kiu en la 1980-aj jaroj havis du scenarojn, el kiuj unu deiris de disfalo de la komunisma bloko kaj tiel havis avantaĝon kompare al aliaj kompanioj kiam tiu disfalo okazis. Oni uzas scenarojn ankaŭ por kreskigi la politikan konscion pri iu problemo, ekz. pri la “griziĝo”, t.e. la relativa kresko de la procentaĵo de maljunuloj kompare kun la junuloj en la populacia piramido. Tio havas konsekvencojn por la nombro da laborantoj, la laborvivo-daŭro, la nombro da robotoj

(Japanio) kaj la pensioj de laboruloj.

Scenaroj povas ankaŭ stimuli ideojn pri dezirataj ŝanĝoj en la socio, ekz. se oni strebas al daŭrigebla disvolvo (ne uzu la terminon “daŭripova evoluo”, ĉar evoluo estas aŭtonoma procezo kaj ankaŭ sen interveno de homo daŭros). Oni povas fari tion naciskale, sed ankaŭ regionskale. Scenaro pri la energioprovizado en estonteco povas ankaŭ esti tendencrompa. Per tia scenaro oni povas pli bone kompreni la eblojn kaj maleblojn kaj malfacilaĵojn kiujn oni povas renkonti survoje al pli bona vivmedio.

BERT DE WIT

# Best-rajta agado: de cito al decido

Ĉi artikolo resumas/komplementas dumkongresan kontribuon pri Bestrajta agado

Kvankam la bestrajtaj aktivuloj certe ne estas plejmulto sine de SAT (nur kelkaj aktivuloj raportas pri propra tia agado en kunsidoj de Vegetara Sekcio), sufiĉe multnombraj estis la ĉeestantoj por la unua prelego-debato de la tago en tiu kongresa vendredo. Tio ne mirigas, fakte, ĉar se ne multas la aktivuloj precize pri tiu fako, tamen ĉiuj havas iun koncernon pri la temo, ĉar ĉiu per siaj ĉiutagaj elektoj (ekzemple manĝaj) vole-nevole influas la kondiĉojn de bestoj uzataj por homa profito.

Por malfermi la diskuton (ja ne temis pri katedra prelego sed la celo estis interŝanĝado de ideoj, vidpunktoj kaj argumentoj laŭeble plej malferma), ĉeestantoj per nombro-eldiro elektis blinde citaĵojn, kiuj estigis bazon por sekva debato. Nur unu mi ĉi-tie prezentos, ilustre:

“Nenio pravigas rifuzi etendon de la fundamenta principo pri egaleco de konsidero de intereso al anoj de aliaj specioj — krom la egoisma deziro gardi la privilegiojn de la ekspluatanta grupo.” Piter’ Singero (Peter Singer). Alia instigilo al pripensado estis prezento de la tiel nomata “tramo-problemo” (kun ŝanĝeto), kiu estas klasika ekzerco en psikologia fako. Ĝin mi ne detalos ĉi tie, sed ĝi konsulteblas filmete je ĉi adreso:

<http://apetito.ikso.net/video>

Preter la demando ĉu ekzistu rajtoj por la bestoj aŭ nur devoj de homoj rilate al bestoj, la kialoj de etika sinteno al bestoj sekvas komunuzan moralan principon, ke ne akcepteblas kaŭzi suferon al bestoj sen pravigebla kialo. Do samkiel al ĉiu evidentas, ke bati hundon sen kialo krom plezuro ĝin bati estas fiagado kontraŭ-batalenda, bestrajtismo atentigas, ke samlogike mortigi aŭ suferigi beston por manĝi (bestdevenaj nutraĵoj), sin vesti (felo, lano, ledo...), sin distri (cirkobestoj, virbovbataloj, dorlotbesta merkato), sin ŝminki aŭ sin kuraci (bestotestado) principe ne akcepteblas, se eblas fari alimaniere sen endanĝer-

igi nian bonfarton.

Ĝuste tiusence eblas simple difini veganismon: strebado eviti ĉiajn nenecesajn suferigojn al bestoj. En tio ne estas dogma fanatikismo aŭ ekstremisma trudemo, sed simple aplikado de la por kuracistoj konata aforismo de Hipokrato: “unue, ne malutili”.

Bedaŭrinde, malhelpas homojn transiri al pacismo vegana (per nura ĉesigo de partopreno al ĉiutaga bestomilita masakro) alia ideologio, pli insida ĉar plejofte nekonscie influanta, tio estas karnismo. Ĝi resume, laŭ tio kiel ĝin konceptas la socia psikologo Melani’ Ĝoj’ (Melanie Joy), kredigas ke manĝi (kaj ajniel uzadi por sia propra intereso) bestojn estas Normala (tion faras la plejmulto), Natura (jen estas la ĝenerala kutimo, jarmilojn longa), Necesa (bestproteinoj pli indas ol vegetaĵaj, ekonomie bestekspluatado ebligas homojn vivteni sin). Sed tiu N-triopo ne longe eltenas racian ekzamenadon, kaj kun malmulte da kritika pensado rapide disfalas la karnismaj mitoj (1). Ekde kiam tiu teoria, filozofia parto estas klarigita, indas iri al konkretaĵoj, ĉar bestrajta agado ne limiĝas al vorta batalo (kvankam ĝi estas neneglektinda parto sendube grava).

Bojkotado (ne nutri fisistemon per nia monujo) estas plej simpla paŝo farebla je individua skalo, kaj koncernas ĉiajn aspektojn de la praktika vivo: ne aĉeti dorlotbestojn el bredejoj, ne viziti bestocirkojn, ne aĉeti bestdevenajn produktojn kiel viandon, ovaĵojn, laktaĵojn, ne vesti sin per alies haŭto, ne purigi sin aŭ la hejmon per bestotestitaj produktoj.

Kompreneble kiel en ĉiu ajn politika movado, nura persona konduto ne sufiĉas, sed indas ankaŭ agadi direkte al ekstera publiko, kolektive. Tion eblas fari aliĝante al bestrajta organizo (milda/radikala, faka/ĝenerala, loka/monda, esperanta/alilingva...), klerigante pri nuna sistemo kaj eblaj alternativoj, do konsciigante per



informado/denuncado kadre de budoj, filmetoj, eventoj, donante praktikajn dietajn konsilojn. Sed ankaŭ proponante pozitivan aliron por kuraĝigi kaj helpi al transirado (per kuirreceptoj, indiko de markoj de veganaĵoj, vendejoj alternativaj...).

Kerna afero estas kompreni, kiom grave estas povi dum ekstera disvastigado tuŝi individue la homojn, kiuj ĉiuj havas propran aliron al la afero. Pri tio ne ekzistas mirakla recepto sed nepras ĉiama adaptiĝo kaj takta aliro, kaj ĉiutage eblas tiukampe agadi tra diskuto kun proksimuloj (parencoj, kolegoj, amikoj), videbligado de propra konduto (vestoj, manĝoj), lertiĝo en esprim-strategioj (neagresa prezento de veganismo, evito de persona juĝado, respekto plena aŭskultado de ĉies argumentoj...).

Konkludo (provizora, ĉar pli bone, se la diskuto malferme pluas ankaŭ kun disopiniantoj kaj naskas pliajn ideojn pri konkretaj agadebloj): ni ja havas eblon interveni, eĉ nepre influas per nia ĉiutaga vivo, kiel traktataj estas nehomaj animalaj individuoj, do ni uzu tiun nian povon kaj faru niajn elektojn kaj decidojn konscie kaj laŭcele!

MARKOVO-VITO 35521

(1) La temo pri karnismo (samkiel la nocio pri speciismo, inter specioj diskriminacia sistemo analoga al rasismo kaj seksismo) meritas en si mem plenan artikolon. Ni do rendevuu pri tio en ontaj S-uloj!

# Minacas Eŭropon faŝismo en Hungario

**Kreskas faŝismo kaj la ekstrema dekstrularo tra Eŭropo. Unu el la fontoj de tiu idearaĉo estas la nuntempa reĝimo en Budapeŝto.**

Decembre 2015 diplomatoj el Usono, Israelo kaj el multaj aliaj landoj veturis al la hungara urbo Székesfehérvár por protesti kontraŭ la planita starigo de statuo de Bálint Hóman. Apogis la statuan projekton kaj la hungara registaro kaj la urba konsilantaro.



**Bálint Hóman**

Bálint Hóman (1885-1951) estis historiisto, parlamentano kaj edukadoministro dum la 1930-aj jaroj, kiu elstaras inter tiuj, kiuj verkis hungarajn antisemitajn leĝojn. Li ĉiam subtenis la aliancon kun la Tria Regno, kaj en 1944 apogis la deportadon de la hungara judaro. En 1945 li forkuris el Hungario kune kun la restuloj de la sagokruca registaro. En 1946 oni punis lin per dumviva enkarcerigo; li mortis en malliberejo.

Tamen la hodiaŭa politika demando estas: kial Viktor Orbán, la diktatorema hungara ĉefministro, volis statuon de tiu viro en la urbo en kiu li lernis dum la 1970-aj jaroj?

Tute simple, la nuntempa hungara registaro montras diversajn aspektojn de faŝismo, nova kaj malnova. Orbán asertas, ke li konstruas “nacion-kristanan” ŝtaton. Per la vorto “nacia”

li volas indiki ne ŝtaton por ĉiuj loĝantoj en la lando, sence de tradicia civitana ŝtato, sed ŝtaton por etnaj hungaroj, ĉu ili loĝas en Hungario aŭ en la najbaraj landoj.

Per la vorto “kristana” en “nacia-kristana” ŝtato, oni ne intencas indiki tiujn homojn religiemiajn aŭ tiujn ĉeestantajn diservojn. En Hungario oni ĝenerale komprenas ke “kristana” simple signifas ne-judan. Ĉiuokaze kiam ajn Orbán kaj aliaj FIDESZ-anoj atakas liberalismon, kosmopolitismen, la internaciajn bankojn, aŭ freneze atakis la bankiston kaj filantropon George Soros, kiun ili ridinde kulpigas pro la krizo pri rifuĝintoj en Eŭropo, ili intencas antaŭenigi antisemitismen, sed kompreneble sen mencii la vorton “judo”.

Estas facile aldoni islamofobion al la antisemitismo de la reĝimo. En 2015, dum rifuĝintoj volis transveturi tra Hungarion al la okcidentaj landoj de Eŭropo, Orbán ekkaptis la eblon stimuli ksenofobion kaj islamofobion ene de la hungara loĝantaro. Normalaj trajnservoj, veturantaj okcidenten el Budapeŝto, kiuj antaŭe forportis la rifuĝintojn al okcidenta Eŭropo, baldaŭ fermiĝis por rifuĝintoj, pelantaj ilin en



**Bálint Hóman**



**Viktor Orbán**

tiel nomatajn “Transit-Zonojn”, senŝirmajn kaj homplenajn beton-subpasejojn ĉe la ĉefstacioj fervojaj. Hungara televido feliĉe filmis tiun “subularon” enŝovitan en tiujn ĉi malmultajn kvadratmetrojn da spaco. Nur kelkaj civitanaj organizaĵoj hungaraj kaj internaciaj helpis la mizerulojn pluvivi; eĉ gravedaj virinoj devis naski sur la betonplanko, ĉar ne akceptis ilin hungaraj malsanulejoj. Orbán pligrandigis sian malamplenan retorikaĉon: la rifuĝintoj minacas la kristanisman en EU; Angela Merkel, EU kaj la hungaraj helporganizaĵoj perfidas kristanan Eŭropon.

FIDESZ sukcesis en la 2010-a landbaloto kaj akiris pli ol duonon de la voĉdonoj, foriginte seninspiran, sencelan kaj iomete koruptan liberalan kaj malforte socialdemokratran registaron. La allogo de Orbán estas tio, ke oni vidis lin kiel fortulon kiu “solvos” la multajn problemojn en Hungario. La konstitucion ili reverkis; ĉian povon ili centralizis – kaj ĉiun ŝtatorganon ili plenigis per FIDESZ-jesuloj: la ŝtatan televidon, la elektran komisionon. En 2014 Orbán malferme deklaras ke Hungario nun estas malliberala demokratio. Orbán distribuas laŭdon inter la diktaturoj de la mondo, kaj asertas ke homaj kaj



Viktor Orbán kaj Hillary Clinton

civitanaj rajtoj signifas nacian malfortecon.

Subteni la (nacion-kristanan) burĝaron estas la malferme deklarata politiko de la reĝimo. Por realigi tion, oni direktas ĉiun ŝtatan socioprofiton al la pli riĉaj tavoloj en la socio, speciale por eviti donadon de monhelpo al la plejmizeruloj en Hungario, la ciganoj. En la ekonomio ekzistas tiel nomata mafio-ŝtato, en kiu troviĝas maljustaj leĝoj, kiuj movas monon al la por-FIDESZ-aj oligarkoj supren, kaj al por-FIDESZ-aj etburĝaj komercistoj malsupren.

Tra la lando la plejparto de la hungara ekonomio estas neevoluinta kaj senkreska: troviĝas duonurba pejzaĝo plena je senmetiuloj kaj maljunuloj. Jam kvin procentoj el la hungara loĝantaro elmigris al okcidenta Eŭropo kaj eĉ pli da ili al la ĉefurbo Budapeŝto. La diskursaĉo de Orbán, kiu kulpigas kaj igas propekaj kaproj judojn (malrekte) kaj islamanojn (rekte), kosmopolitanojn, samseksemulojn kaj “kontraŭ-hungarajn” hungarojn, gajnas subtenon inter la vicoj de la “postlasitoj”. Oni povas trovi similaĵojn en Slovakio kaj Pollando, sed la situacio plej malbonas en Hungario.

La reĝimo, kiu ĝis nun ne uzas perforton kontraŭ siaj kontraŭuloj, estas versio de la faŝismo kaj ekstremdekstra populismo, kiuj malpurigas la tutan Eŭropon. Oni devas tion kompreni kaj ilin alfronti.

VS

Junio 2016

## INTERVJUO AL MARYAM FATHI, KURDA AKTIVULINO

# “Nia strategio estas eduki la civitanojn je egaleco”

Pri la subpremado de la kurdoj paroladas Fathi ĝenerale kaj pri tiuj, kiuj vivas sub la reĝo de Irano speciale, ĉar de tie ŝi forfuĝis. Por la estontenco ŝi agas cele al organizado de “novaj sociaj frontoj”.

Maryam Fathi (Marivan, Kurdio, 1982) antaŭ jaro alvenis en Bilbon kun sia filo. Antaŭ kvin jaroj ŝi forlasis sian landon, Orientan Kurdion [1]. Estis kruta vojaĝo, malfacila komenco en la ekzilo, sed tie restinte atendus ŝin la karceroj pro ŝia lukto favore al la inaj rajtoj. Ŝi prelegis en Hernanjo pri la ina lukto ene de semajna staĝo dediĉita al Kurdio.

## Kiel vi vivas la Noruzon [2] en la ekzilo?

Por ni ege malfacilas esti for de la hejmo. De la infaneco ĝi estas la nura festo, kiun ni sentas kiel nian. Ĉi-jare estas speciale kruela.

**En la lastaj jaroj oni aŭdis pacmesaĝojn okaze de la Noruzo. Tamen, tiun ĉi jaron la kunteksto estas tute alia.**

La espero estas parto de nia popolo. Ni kredas je la estonteco sed la situacio estas kruela. Depost la junia balotado en Turkio, kaj ankaŭ antaŭe, la Turka Registaro bombadas aviadile la montojn de Kurdio. Ankaŭ tiujn, kiuj kuŝas en la iraka flanko. Kaj ĝi sturmis per tankoj urbojn kaj vilaĝojn kaj mortigis centojn da civiluloj. La turka registaro ne volas agnoski la rajtojn de la kurda popolo. Ĝi sentas sin minacata ĉar ni avancis en la siria flanko.

**El Rojavo [3] venis bona novaĵo lastatempe, per la proklamo de Kurda Federacio.**

Temas pri ege grava paŝo, kiu donas forton al ni por esti kuraĝaj fronte al la masakro. Ĉio, kio okazas en iu ajn parto de Kurdio influas sur ĉiujn kurdojn, ĉar ni batalas por faliĝi ĉiujn landlimojn, kiujn oni trudis al ni perforte. En la siria flanko, liberiginte Rojavon, ni estas liberigantaj la kurdojn el sub la reĝo de Irano. Kiam la Turka Registaro masakras, ĝi agas kontraŭ ĉiuj kurdoj.



Maryam Fathi

**Pri la kurda teritorio sub la reĝo de Irano venas malplej da novaĵoj. Kia estas la situacio?**

Estas la regiono plej izolita dum la lastaj 35-40 jaroj. Irano mem estas ankaŭ izolita lando. Ĝi estas armeigita la tutan jaron. La irana registaro havas nenium kompromison cele respekti la homajn rajtojn, kaj surstrate oni tre facilanime pafas kontraŭ la homoj. La grupoj kaj politikaj partioj favorantaj la inajn kaj homajn rajtojn ne povas labori, se ili ne agas laŭ la ordonoj de la registaro. Kiam oni kaptas socian aŭ feminisman aktivulon, oni tiun submetas al kvinminuta juĝado, sen advokato, kaj tiun deklaras malamiko de dio; oni kondamnas je dumviva mallibereco aŭ ekzekutas. La prizonuloj suferas tre kruelajn torturojn, oni seksperfortas ilin, kaj

estas multaj en tiu situacio. La celo estas timigi la loĝantaron, por ke ĝi ne moviĝu.

#### **Kun la nova registaro de Ruhani [4], ŝanĝigos la situacio de la kurdoj?**

Ni ŝatus, sed ne. Ĵus okazis balotado por la parlamento, sed nur ili decidis kiu povas sin prezenti por atingi reprezentantecon kaj kiu ne. Ilian kribadon sukcesas trapasi nur tiuj, kiuj estas je la flanko de la registaro. Ni ne havas reprezentanton.

#### **Pri kio laboras nun la partioj DPIK [5], Komele [6] kaj PLVK [7]?**

Ili estas eksterleĝaj. La PVLK gerilas en la montoj. La DPIK kaj Komele restas en la kampadejoj de Suda Kurdio [8]. Se la irana registaro vidas, ke estas reprezentantoj, kiuj rilatas kun ili, ĝi ekas juĝproceson. La nia estas memdefenda lukto, ĉar militon ni havas ĉiam hejme. La DPIK kaj Komele gerilis dum multaj jaroj kontraŭ la irana registaro, sed ili lasis la armilojn, ene de akordo, kiam oni starigis la RKR [9].

#### **Kiun strategion disvolvas nuntempe la milita branĉo de la PLVK?**

La nura partio, kiu nuntempe subtenas la partizanan lukton estas la PLVK, kaj ĉi havas virajn kaj inajn taĉmentojn. En 2010a estis grava

interpuŝiĝo inter Irano kaj la PLVK. Irano kaj la RKR paktis batalhalton, interŝanĝe de la ĉeso de la ekzekutoj. Sed tio ne signifas, ke la gerila lukto finiĝis. En ĉiuj montoj estas partizanoj, ĉiam pretaj batali. Sed ni ne povas militi en la kvar partoj de Kurdio. Ni ŝanĝis la strategion.

#### **Kiu estas la nuna strategio?**

Se orienta kurdio ne militas, estas pro la nuna strategio. Nia strategio estas eduki la loĝantojn je egaleco. Ni havas la konfederacian sistemon. Mi pretigas la socion, el la flanko de la edukado, starigante kanalojn favore al la inoj. Same kiel en Roĵavo [3], ni konstruas en la asocia teksaĵo novajn sociajn frontojn por la estonto. Ni havas rilatojn kun la aliaj nacioj Irano por alfronti ties registaron kaj, kiam alvenos la momento, ni estos pretaj. Ni ne volas en Irano tion, kio nun okazas en Sirio.

#### **En la gerilo la inoj kaj la viroj samnivele agadas.**

*Intervjuo de A. Mujika Tolaretxipi (Hernanio) originale aperinta en la eŭska ĵurnalo Berria la 22-an de Marto 2016-a. Tradukis: NXC. Majo 2016-a.*

**Notoj** (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):

[1] Orienta Kurdio/Rojhilatê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Irana ŝtato.

[2] Tradicia novjara festo en multaj landoj de Meza kaj Centra Azio.

[3] Okcidenta Kurdio/Rojavayê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Siria ŝtato.

[4] Haran Ruhani, nuna prezidento de Irano.

[5] Demokrata Partio de Irana Kurdio (DPIK)/Partiya Demokratîk a Kurdistanî Êranî (PDKI).

[6] Asocio de Revoluciaj Laboristoj de Irana Kurdio (ARLIK)/Komeley Şorrişgêrrî Zehmetkêşanî Kurdistanî Êran (simpligite KZK aŭ Komele). Komele estas kurda vorto signifanta “socio” aŭ “asocio”.

[7] Partio por Libera Vivo en Kurdio (PLVK)/Partiya Jiyana Azad a Kurdistanê (PJAK).

[8] Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.

[9] Regiona Kurda Registaro (RKR)/Hikumetî Herêmî Kurdistan (HHK/KRG).

## Blanka malriĉeco

“The Daily Caller” refutas la vaste disvastigitan opinion pri tio, ke malriĉeco en Usono estas nepra atributo nur de komunumoj de nigrahaŭtuloj.

Antaŭ kelkaj tagoj senatano el la usona ŝtato Vermont, kiu estas ankaŭ kandidato al prezidanteca posteno de Usono, Bernie Sanders, kaŭzis veran socian tempeston en medioj de amasa informado, kiam li deklaris, ke esti blankulo signifas nescii kiel estas vivi en geto kaj esti malriĉa. Sed laŭ popolnombro en Usono en la jaro 2010 (kiam okazis la popolnombro) la 5 plej malriĉaj distriktoj de la lando havas almenaŭ 95% da blankula loĝantaro.

Do, jen estas la plej malriĉaj distriktoj en Usono:

La distrikto Owsley (ousli), en la ŝtato Kentucky (kentukki), kiun oni

nomas “Granda blankula geto”. Se tie ne estus 98,5% da blankula loĝantaro, tiam ni opinius, ke ĝi estas preseraro. Kaj se 98,5% da loĝantaro tie ĉi estus ne la blankaj usonanoj, ni nomus la distrikton... rezervejo.

La dua plej malriĉa distrikto en la lando estas la distrikto Lee (li), en la ŝtato Kentucky. Tie vivas 95% da blanka loĝantaro kaj nur 2% da nigrahaŭta kaj 1% da latin-amerikanoj.

Se ĝenerale diri, 4 el la 5 plej malriĉaj distriktoj de Usono estas en Kentucky. Kamparaj partoj de tiu ĉi ŝtato, kiel regulo, estas loĝataj de blankuloj, kaj estas tre malriĉaj. En la jaro 2014 “The New York Times” nomis la 10 plej pezajn – por la vivo – distriktojn de Usono; el ili 6 situas en la norda parto de Kentucky.

La distrikto Clay (klej), kiu eĉ ne estas en la kvino da plej malriĉaj

usonaj distriktoj, estis taksita de la ĵurnalo kiel la plej peza loko por vivado de usonanoj. La loĝantaro de Clay je 94% konsistas el blankuloj. Ne vane la senatano de Kentucky Rand Paul (rend pol) alvokis al grandskala malgrandigo de impostoj por la plej malriĉaj loĝantoj de la ŝtato – por doni impulson al evoluigo de la loka ekonomio.

Inter la plej malriĉaj distriktoj endas menci la distrikton Brooks (bruks), en la ŝtato Texas (teĥas), kiu situas proksime al la limo kun Meksiko. En tiu ĉi distrikto loĝas 96% da blanka loĝantaro.

*Esperantigis Andris Natinš el la latvia ĵurnalo “Vesti segodnya”*



# Parolado far nuntempa Sokrato

Ĝenerale, mi ne ŝatas politikistojn. Kutime ili prikrias kaj vendas produktojn jen falsajn, jen ne allogajn al miaj oreloj.

Mi ne ŝatas instituciajn pintkunvenojn por savi aŭ eviti ion ajn. Kutime ili partoprenatas de multaj el la ŝtatoj kaj homoj responsaj, tamen tute malemaj korektiĝi, pri la problemoj, kiujn oni teorie volas solvi. Kompreneble, oni nenion solvas tie. Temas pri instituciaj farsoj.

En 2012, en Rio-de-Ĵanejro (Brazilo), okazis unu el tiaj pintkunvenoj, la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj por Daŭrigebla Disvolvo, alnomata 'Rio+20', kiu havis kiel ĉeftemon la medion kaj la manieron ĝin protekti. Kompreneble, ĉi aranĝo ne estis escepta. Jen kelkaj titoloj legeblaj en la tiama gazetaro pri tiu senutila evento: "La verda pintkunveno finiĝas per desaponto", "La ŝtatestroj ne kapablis antaŭenpaŝi pri mediaj politikoj", "Ne violentaj, kvankam ja amasaj, manifestacioj kontraŭ 'Rio+20'", "Gajnis la burokratio, perdis la Tero".

Sed, meze de tia cirko, ŝprucis klara, kuraĝa, modesta, ŝarĝita per plej elementa vero, sokrata, la voĉo de José Mujica, tiama prezidento de Urugvajo. Por mi Mujica estas unu el la malmultaj politikistoj vere respektindaj, ĉar konsekvenca kaj honesta. Li fariĝis konata kiel gvidanto de la Movado por Popola Partopreno, majoritata organizo ene de la koalicio Ampleksa Maldekstra Fronto. Balote elektite Prezidento de la Orienta Respubliko de Urugvajo en 2010, li tute ne ŝanĝis sian aŭsteran vivon. Li ne transloĝiĝis al la oficiala prezidenta restadejo, sed vivis(as) plue en sia propra modesta bieno, kie, kune kun la edzino, li jam de longe okupiĝas pri kultivado de floroj. Naŭdek procentojn de sia prezidenta salajro li sisteme dediĉis al projektoj pri helpo kontraŭ malriĉo.

Abundas en la reto frandindaj intervjuoj al li faritaj kaj plej sukaj deklaroj kaj paroladoj far José (pli konata kiel Pepe [Joĉjo]) Mujica. Inter ĉi lastaj, mi aparte ŝatas tiun de li



José Mujica

eldiritan la 20an de junio 2012 kadre de la jam menciita 'Rio+20', kie li, kiel ĉi-epoka infano de la Andersen'a La novaj vestoj de la reĝo, ekkriis al la eminentaj pintkunvenanoj: "sed la reĝo ja estas tute ne vestita!" jene:

"Ĉeestantaj aŭtoritatoj el ĉiuj mondopartoj kaj institucioj, koran dankon. Koran dankon al la brazila popolo kaj al ties prezidentino, S-ino Dilma Rousseff. Koran dankon al ĉiuj oratoroj, kiuj antaŭis min pro la honesteco, kiun sendube ili manifestis. Mi esprimas mian elkoran volon aliĝi al ĉiuj akordoj, kiujn povos subskribi mi kiel modesta reganto.

Tamen permesu al mi fari kelkajn demandojn laŭtvoĉe. La tutan posttagmezon oni parolis pri daŭrigebla disvolvo. Pri tio eltiri enormajn homamasojn el malriĉo.

Kio do flirtas en niaj kapoj? Ĉu la nuna modelo de disvolvo kaj konsumo de la riĉaj socioj? Mi faras al mi jenan demandon: kio okazus al ĉi planedo, se la hindoj havus saman proporcion de aŭtoj por ĉiu familio kiel la germanoj? Kiom da oksigeno restus al ni por spiri? Pli klare: ĉu hodiaŭ la mondo havas la materialajn rimedojn sufiĉajn por ebligi, ke sep-ok miliardoj da homoj povu havi saman gradon de konsumo kaj de ekscesa elspezado kiel havas la plej riĉegaj okcidentaj socioj? Ĉu tio eblas, aŭ ni devos iam teni


alitan diskuton?

Ĉar ni kreis ĉi civilizacion, kie ni troviĝas, idon de la merkato, idon de la konkurenco, havigintan mirigan kaj atent-altiran progreson. Sed la merkatekonomio kreis merkat-sociojn. Kaj havigis al ni ĉi tutmondigon, kiu implicas zorgi pri la tuta planedo.

Ĉu ni direktadas la tutmondigon aŭ la tutmondigo direktadas nin? Ĉu eblas paroli pri solidareco kaj pri tio, ke 'ni ĉiuj kunas' en ekonomia sistemo bazita sur senkompata konkurenco? Ĝis kie atingas nia frateco?

Ĉion ĉi mi diras ne por nei la gravecon de ĉi evento. Male: la defio stara antaŭ ni kolose grandas kaj la granda krizo estas ne ekologia, sed politika.

Hodiaŭ la homo ne regas la fortojn, kiujn li liberigis, sed la fortoj, kiujn li liberigis, regas la homon. Kaj la vivon. Ĉar, se paroli ĝenerale, ĉi-planeden ni venas ne nur por disvolvi nin. Ĉi-planeden ni venas por feliĉi. Ĉar la vivo mallongas kaj foriradas. Kaj neniu bono valoras kiel la vivo, ĉi tio estas la plej elementa vero. Sed la vivon ni disipas en plua kaj plua laborado por fari kromkonsumon, kaj la konsum-socio estas la motoro, ĉar, definitive, se la konsumo paraliĝas, la ekonomio haltas, kaj se la ekonomio haltas, aperas la fantomo de stagno por ĉiu el ni, sed ja tia hiperkonsumo



Sokrato

agresadas la planedon. Kaj oni devas generi tian hiperkonsumon, peni, ke la aĵoj daŭru malmulte, ĉar endas vendi multe. Do elektra lampeto ne lumu dum pli ol 1 000 horoj. Sed estas elektraj lampetoj, kiuj povas lumi dum pli ol 100 mil horoj! Tamen ĉi tiujn oni ne devas fabriki, ĉar la problemo estas la merkato, ĉar ni devas labori kaj ni devas subteni civilizacion bazitan sur la devizo “uzu kaj forĵetu”, kaj tiel ni staras en magia rondo.

Ĉi tiuj estas problemoj kun politika karaktero, kiuj indikas al ni, ke estas jam tempo komenci batali favore al alia kulturo.

Temas ne pri tio ke ni starigu al ni reveni al la epoko de la homo de la kavernoj, nek pri tio, ke ni konstruu

‘monumenton al la postiĝinteco’. Sed ni ne povas plu, senfine, esti regataj de la merkato, sed, kontraŭe, ni devas regi la merkaton.

Tial, laŭe al mia humila pensmaniero, mi diras, ke nia problemo havas politikan karakteron. La oldaj pensuloj – Epikuro, Seneko aŭ eĉ la ajmara popolo [1] – asertis jenon: ‘malriĉas ne kiu havas malmulte, sed kiu bezonas ege multe kaj deziras pli kaj pli’. Ĉi tio estas kultura ŝlosilo.

Nu, mi ja laŭdas la penon kaj la akordojn, kiujn oni ĉi tie faras. Kaj ilin mi aplikos kiel reganto. Mi asertas ĉi tion, ĉar kelkaj el la aferoj, kiujn mi diras, rigardatas ‘grincaj’. Sed ni devas konscii, ke la krizo pri la akvo kaj la agreso al la medio ne estas la kaŭzo. La kaŭzo estas la modelo de civilizacio, kiun ni muntis. Kaj tio, kion ni devas revizii, estas nia vivoformo.

Mi apartenas al eta lando tre bone dotita per naturaj vivrimedoj. Mia lando havas iom pli ol 3 milionojn da loĝantoj. Sed en ĝi troviĝas proksimume 13 milionoj da bovinoj el la plej bonaj en la mondo, krom inter 8 kaj 10 milionoj da mirindaj ŝafinoj. Mia lando eksportas nutraĵojn, laktaĵojn, viandon. Ĝi estas peneplano kaj preskaŭ 90 procentoj de ĝia teritorio utiligeblas.

Miaj kamaradoj laboristoj multe batalis por atingi la ok-horan labortagon. Kaj nun ili poiome atingas la ses-horan. Sed kiu havas la ses-horan havigas al si du laborojn kaj, sekve, laboras pli ol antaŭe. Kial? Tial, ke li devas pagi grandan kvanton da

kostoj: la motorciklon, la aŭton... Li pagas kostojn kaj pliajn kostojn kaj, kiam li konsciiĝas pri tio, li estas jam oldulo reŭmatisma – kiel mi –, kiu disipis sian vivon.

Kaj oni sin demandas: ĉu tio estas la destino de la homa vivo? Ĉi aferoj, kiujn mi diras, tre elementas: disvolvo ne devas fariĝi kontraŭ la feliĉo. Ĝi devas fariĝi por la homa feliĉo, por la amo sur la Tero, por la homaj rilatoj, por ke oni zorgu la idojn, por ke oni havu amikojn, por ke oni havu tion elementan.

Ĝuste tial, ke la plej grava trezoro, kiun ni posedas, estas la feliĉo, kiam ni batalas favore al la medio, ni devas memori, ke la unua elemento de la medio nomiĝas homa feliĉo.

Dankon!”

MIGUEL FERNÁNDEZ

[1] La ajmara popolo konsistas el ĉirkaŭ 2 milionoj da homoj, kiuj parolas la t.n. ajmaran lingvon kaj vivas en sud-amerika regiono etendiĝanta laŭlonge de diversaj landoj: Bolivio, Ĉilio kaj Peruo. Ekzistas ankaŭ pluraj komunumoj en la argentinaj provincoj Salta kaj Jujuy, kiuj proklamas sin ajmaraj, kvankam ili ne parolas la ajmaran lingvon. La ajmaroj dediĉas sin al paŝtado kaj al agrokulturo kaj interŝanĝas la produktojn de sia laboro. Jen unu el iliaj plej ŝatataj principoj: peto pri helpo en la nuno estos ja plenumita en la futuro.

## SINDIKATISMO TUTMONDA

### Egiptio: liberigu la malliberigitajn laboristojn de la ŝipkonstruejo



Fine de majo ĉi-jare, la laboristoj en la doko de ŝipkonstruejo en Aleksandrio organizis pacan manifestacion. La Direkcio de la kompanio rifuzis intertraktadi kun ili, forpuŝante iliajn depostulojn. Post sia protestado, la laboristoj estis kunvokitaj de la militista prokuroro. Dekkvin el ili memvole prezentiĝis, kaj surprize estis arestitaj (krom laboristino liberigita kontraŭ kaŭcio). Arestmandato estis lanĉita kontraŭ la dekunu ceteraj laboristoj, kiuj ne prezentiĝis. La dekkvar restas en malliberejo atendante la juĝan decidon. La malliberigitaj laboristoj kaj iliaj familioj ne plu havas mongajnon, dum la aliaj fuĝis kaj riskas iam-ajnan arestadon.

La Centro pri servoj por sindikatoj kaj laboristoj (CTUWS) postulas tujan liberigon de la malliberigitaj laboristoj de la ŝipkonstruejo, alvokas solidarecon de la internacia sindikata movado, kaj diskonigon fare de la defendantoj de homaj rajtoj.

Informo el LabourStart

[https://www.labourstartcampaigns.net/show\\_campaign.cgi?c=3179](https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3179)

## Ekvadoro: la registaro minacas malfondi la sindikaton de la instruistoj

La nacia sindikato pri instruado en Ekvadoro (Unión Nacional de Educadores – UNE) riskas malfondon, post jura proceduro komencita de la Ministrejo pri Edukado. Laŭ UNE, la ekvadora registaro provas malpermesi la sindikaton reprezalie al publikaj ĉi-jaraj deklaroj dum la konferenco de OIT kaj la Komitato pri homaj rajtoj, klarigantaj detale kaj per pruvoj, kiamaniere la registaro malrespektas sisteme la liberecon pri asociado. La registaro pravigas la malfondon per efektivigado de specifa reglamento, la dekreto 16, kiu koncernas la registradon de senprofitaj organismoj. Tamen, la Ministrejo pri Laboro certigis al OIT pli frue ĉi-jare, ke la dekreto 16 ne koncernas la sindikatojn. La Internacio de Edukado kaj la UNE petas de vi, kuniĝi kun ili admonante la ministrojn pri Edukado de Ekvadoro, S-ro Augusto Espinosa Andrade, ke li ĉesigu la juran proceduron kontraŭ la sindikato de la instruistoj, kaj respektu la fundamentajn rajtojn de la laboristoj de edukado kaj de ties organizaĵoj.



Informe el LabourStart

[https://www.labourstartcampaigns.net/show\\_campaign.cgi?c=3159](https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3159)

## Sindikatoj “modernaj” laŭ la mastrara trabanta gazetaro

Sokrateca ironia eseo, verkita la jaron 1994 sed daŭre aktuala, pri la nuntempa propagando al sindikatoj.



La mastroj de la amaskomunikiloj, ege klariginte kia estas “moderna” sindikato, kaj kia “arĥaika”, nun klarigu al ni, kia estu moderna armeo. Armeo, kiu volas esti moderna, respondeca, konstruema, sed ne arĥaika, dogmema, aliĝinta al ekstempa kateĥismo, devus ĉesi kontraŭstari malpozitive al la malamika armeo, sed, male, kunlabori kun ĝi. Ĝi ĉesu defendi per aĉa fikorporaciema reflekso sian landon kaj siajn kunlandanojn, sed devas “preni respondecojn” en la konkero, la detruo kaj la okupado de sia lando far la malamiko. Ĝi devas etendi la manon al ĝi, kaj sidiĝi ĉe la sama tablo por pridiskuti kun la malamikaj generaloj la manieron aranĝi la deportadon de loĝantaroj, la sendadon de la laboristoj al STO [\*], la rekviziciojn, kaj kompreneble unuavice la bombadojn. Anstataŭ stulte instali bateriojn da kontraŭaviadilaj kanonoj, kio estus arĥaika, dogmema kaj malpozitiva, ĝi devas kunlabori kun la malamiko pri aranĝado de la listo de urboj detruotaj, kaj akcepti plej dankeme la tendojn, kiujn la malamiko, same konstruema, donos provizore por ŝirmi iom da tempo parton de la postvivantoj. Jen kia estas respondeca armeo, konstruema kaj moderna! (kaj kiaj la sindikatoj same nomitaj.)

ROLAND PLATTEAU

[\*] Service du Travail Obligatoire (Deviga Labor-Servo), aranĝo de la naziaj okupaciantoj en Francio dum la 2-a mondmilito.

Afiŝo de la 2-a Hispana Respubliko:

“Kapitalo kaj Laboro amike kuniras, kiel devas esti”

## Sud-Koreio: la kamparana aktivulo Baek Nam-gi en komato de pli ol 250 tagoj

La sud-koreia kamparana aktivulo Baek Nam-gi plu estas en komato en malsanulejo de Seulo. Pasintan novembron, li estis frapita de akvokanono fare de la polico, dum amasa manifestacio kontraŭ la registara politiko. Tiu ĉi favoras labormalstabilecon kaj apogas la Transpacifikan Akordon pri Ekonomia Partnereco. Dum li falis, la polico plu direktis la mortigan kanonon kontraŭ li kaj kontraŭ la manifestaciantoj, kiuj provis helpi lin. Pro partopreno en tiu vastega naciskala manifestacio, du sud-koreiaj sindikataj gvidantoj estis kondamnitaj al malliberejo, dum aliaj plu atendas juĝon.

Informo el Neniama milito inter ni

<http://neniammilitointerni.over-blog.com/2016/08/sud-koreio-la-kamparana-aktivulo-baek-nam-gi-en-komato-de-pli-ol-250-tagoj.html>



## Sindikata letero al la Unua ministro de la franca registaro

**Letero de Philippe Martinez, Ĝenerala Sekretario de la franca sindikataro CGT, al Manuel Valls, Unua ministro, kaj Myriam El Khomri, ministrino pri laboro.**

Sinjoro Unua ministro, Sinjorino ministrino pri Laboro, ankaŭ vi konas nian proponon favore al Laborkodo de la 21-a jarcento, kapabla protekti la salajrulojn kontraŭ la efikoj de la konkurado al sociala regreso surbaze de malstabiligo de la laboro kaj de tiuj, kiuj faras ĝin. Mi do koncentros miajn vortojn sur tio, kion eble vi ankoraŭ ne scias: eĉ antaŭ ĝia eventuala akcepto la leĝo t.n. “Loi Travail” (“Leĝo Laboro”) portata de via registaro okulfrape malrespektas la fundamentajn konvenciojn de ILO. Efektive, en 2012, la komitato de ILO pri sindikata libereco juĝis similan aferon pri reformo de la tiama greka registaro, kiu organizis malcentradon de la kolektiva diskuto je nivelo de la entreprenoj. (...) La konkludoj de la komitato ne lasas ian eblan dubon pri tio, ke tiu tipo de reformo konsistigas leĝrompon rilate al la konvencioj de ILO. Mi permesas al mi citi al vi el ili mallongan ekstrakton, kiu resonas kiel averto:

“La komitato substrekas, ke la instalo de proceduroj sisteme favorantaj la malcentritan diskuton de esceptaj aranĝoj en senco malpli favora ol la aranĝoj de supera nivelo povas konduki al tio, ĝenerale malstabiligi la mekanismojn de kolektiva diskuto kaj la organizojn de dungantoj kaj de laborantoj, kaj tiusence konsistigas malfortigon de la sindikata libereco kontraŭ la principoj de la konvencioj 87 kaj 98.”

Por CGT, la signifo de tiu jurisprudenco estas klara. Ĝi trafas mortnaskita la artikolon 2 de la projekto de leĝo t.n. “Leĝo Laboro”. Se la registaro obstinus konservi ĝin, ĝi klare riskigus al Francio gravan kaj tujan malrespekton je la fundamentaj konvencioj 87 kaj 98 de ILO, kiuj, mi memorigas al vi, protektas en la mondo la sindikatajn liberecojn kaj la kolektivajn diskutojn. Nerespondece estus peti venontan semajnon la deputitojn, ke ili akceptu leĝon, kiu tiel klare malrespektas la internacian laboran juron, kaj ankoraŭ pli, tiucele denove uzi la artikolon 49-3. Ni tuj prenus niajn respondecojn, alarmante la publikan opinionon pri tiuj malrespekt-

aĵoj, kaj plendante ĉe la kompetentaj instancoj de ILO. Kaj kredu min, ni trovos plimulton el la sindikataj organizoj por tion fari (...) la projekto de “Leĝo Laboro” kontraŭas la internacian juron. Ĝi duoble kontraŭas ĝin: fronte al ILO kaj fronte al UN. Vi havas nenan eblecon de elekto krom tiu, rezigni ĝin. Aliokaze ni havos nenan eblecon de elekto krom tiu, daŭrigi la mobilizadon kontraŭ maljustan kaj malleĝan projekton.

El “L’Humanité” de ĵaŭdo 30 junio 2016,  
p. 7, elfrancigis Petro Levi



Philippe Martinez

# Novajoj el la klasbatala fronto

La nuna klasbatala situacio en Francio ne estas nova kaj estas nur epizodo, plej grava por ĝiaj travivantoj, de la tutmonda klasbatalo daŭrigita antaŭ jarcentoj en la evoluo de la kapitalista homekspluata sistemo el la feŭda homekspluata sistemo.

Post la fino de la Dua Mondmilito, la franca kapitalistaro, pro sia preskaŭ kompleta alianco – por ĝi finance treege profita – kun la nazia okupaci-anto, estis politike tre malforta kontraste al la (stalinista) Franca Komunista Partio, kiu verŝis konsiderindan kaj efikan sangan kontribuon en la batalo por la liberigo de la lando. Tial en la unua registaro de de Gaulle (de gol) estis kvar komunistaj ministroj, kies laboro rezultigis kolosan socialan progreson en Francio, inspiritan de programo ellaborita dum la Dua Mondmilito (programo de CNR, Nacia Konsilantaro de la Rezistado). La dekstraj politikaj fortoj dum pli ol tridek jaroj eĉ ne aplombis nomi sin dekstraj. Tio ŝanĝiĝis post 1980 kaj tiu ŝanĝo akceliĝis post 1991, nome post la detruo de Sovetio.

Ekde 1983, Mitterrand oficiale rezignis politikon konforman al la slogano “socialismo por Francio”, laŭ kiu li estis elektita kiel prezidanto de la respubliko. De tiam la sinsekvaj registaroj, teorie dekstraj aŭ maldekstraj, aplikis pli kaj pli reakcian politikon. Unu el la aspektoj de tiu politiko estas amasa detruo de produktorimedoj kaj privatigo (konfisko profite al privataj posedantoj) de naciaj posedaĵoj, evoluo de la industria kapitalo al financa kapitalo [\*], amasaj publikaj donacoj al privata kapitalo kaj konsekvence amasaj maldungoj kaj kreskanta senlaboreco.

La mastraro, kiu ĝis tiam rezistis al

la laboristaj postuloj, komencis prezenti politikajn postulojn, kiujn la sinsekvaj registaroj tiom pli fervore provis kontentigi, ke tio konformis al eŭropunia radikale liberalisma orientiĝo. Konstanta alstrebado estas “redukto de la prezo de la laborforto”, kiu estas matematike identa al “politika kresko de la profitkvoto, de la senlaboreco kaj de la sociaj mal-egalecoj” kaj rekte kontraŭas la celon anoncitan kiel pretekston, nome reduktion de la senlaboreco.

Jam de jaroj MEDEF (franca plej radikale reakcie klasbatala sindikata kaj politike prema mastra organizo) malkaŝe celas, sub la nomo de “necesaj reformoj”, la detruon de ĉiu socia progreso akirita de la franca laboristaro per jardekoj da klasbatalo, sed precipe akirita okaze de la Popola Fronto en 1936 kaj de la unua registaro de de Gaulle, inspirita de la programo de CNR.

La nuna konflikta situacio rezultas de la t.n. “Loi Travail” (“Leĝo Laboro”), per kiu la teorie “socialista” registaro de Hollande decidis kontentigi la francan mastraron. Ĝi simple celas subordigi la aplikon de la laborprotektaj leĝoj al la bonvolemo de la mastroj.


MEDEF aplaŭdas kaj kreskigas siajn postulojn.

Batalon kontraŭ tiun reakciegan reformon kondukas CGT, FO kaj pluraj aliaj sindikataj organizoj. La registaro rebatas ĉiarimede perforte kaj la plimulto el la informrimedoj, posedataj de la mastraro, intensigas sian ideologian batalon kontraŭ la laborista rezisto, provante senkreditigi tiun ĉi kaj favori pasivan rezignacion.

PETRO LEVI



Charles de Gaulle



François Mitterrand

[\*] Tio signifas, ke la reala povo ne plu estas tiu de la direkto de la industria entrepreno, sed estas tiu de la financa institucio, de kiu la industria entrepreno dependas.



# Ĉu homoj fariĝas fiŝoj?

Sur herbo kuŝas vestaĵoj bele aranĝitaj. Aldo, la knabeto, longe rigardis de malproksime, sed pelite de scivolemo li decidis alproksimiĝi. Tie li staras ŝtonigite kun la okuloj fiksataj sur la akvo. Bobeloj sorirantaj de la profundo ĵus venis krevigi la ebenan surfacon fajrerantan sub la sunradioj. Ili naskas cirklojn, kiuj pli kaj pli grandiĝas, kuras sur la akvo por veni sveni ĉe borde.

Estas la sesa, kiam la pordo malfermiĝas. Ema, ĉiam kaŝita malantaŭ sia fenestro, vidas sian najbaron eliri. Ŝi iomete malproksimiĝas en la mallumo por ne esti vidata. Malfrue! Karlo ekvidis ŝin. Por li, ke ŝi estu aŭ ne ĉe sia fenestro, tio estas tutegala. Li iros, kien li decidis iri, kaj faros, kion li decidis fari. Revenante en la liton kun vespiro, Ema diras al sia edzo:

— Hodiaŭ la vetero estos bona, ĉar Karlo ne metis pluvmantelon. Mi volus scii, kial li ĉiam kunportas plastan saketon en la poŝo. Mi ne bezonas saketon por promeni!

Ŝia edzo nenion respondas! Li de longe komprenis, ke tio estus tute senutila...

Karlo jam laŭiras la malnovan ponton super la rivero. Li unue iras rapidpaŝe. La aero estas freŝa kaj agrable milda. Eta vento flirtas kun la folioj je la supraĵo de la platanoj. Laŭ sia kutimo li salutas la renkontitajn marŝantojn. Iuj iras kvietpaŝe dum la aliaj normale marŝas, trotas aŭ kuras, unuope, duope, multope. Evidentaĵo estas, ke ĉiuj tiuj homoj havas siajn proprajn kialojn por tie ĉeesti. La bela vetero kaj la beleco de tiuj lokoj tute sufiĉas por pravigi tiom da asiduo en tia ŝatokupo. Malofte la renkontatojn

Karlo vidas la unuan fojon, ĉar plejparte estas frekventuloj...

Ĉe vojkurbiĝo, venante de ia pado enprofundiĝanta en la proksiman arbareton, ekaperas viro, kiun li jam renkontis antaŭe. Karlo diras al si:

— Li alpaŝas tiel rapide, ke li povas almenaŭ trifoje fari la ĉirkaŭiron de la lago, kiam mi estos ankoraŭ je mia unua rondiro.

Alvenante je lia nivelo, la viro diras:

— Ĉu vi rimarkis, ke jam fungoj kreskas ĉie?

— Jes! Mi vidis kelkajn.

— Mi ne estas sperta pri fungoj, tamen kelkaj devas esti manĝeblaj.

Li aldonas, rigardante la saketon, kiun Karlo havas enmane:

— Ĉu vi kolektas iujn?

— Ne! Tute ne, kara sinjoro! Sed rigardu mem la trezoron, kiun mi sukcesas ekhavi ĉiutage!

Klinante la kapon antaŭen super la faŭko de la sako, li mirigite ekkrias:

— Ho! Sed, kio estas tio?

— Metalaj skatoletoj de biero kaj frukto-suko ĵetitaj ĉiuflanken. Homoj estas malbone edukitaj! Ili agas, kvazaŭ ne ekzistus konsekvencoj. Tiuj skatoletoj, el aluminio kaj stanita ferlado, interne kovritaj per protekta tavolo enhavanta bisfenolon A, estas bomboj. La naturo bezonas almenaŭ 150 jarojn por komplete digesti ilin. Ili grave poluas la grundon. Estas grava katastrofo! Se ni nenion faras, niaj infanoj heredos mondon komplete venenitan, neenviveblan.

— Vi tute pravas! Estas la unua fojo, kiam mi vidas homon, kiu plenzorge tion faras! Sed kion vi faras el tiuj skatoletoj?

— Hejme mi metas ilin en fakan rubejon por recikligado.

— Mi multe dankas vin pro tio, kion vi faras. Anstataŭ promeni kun la manoj en la poŝoj, eble ankaŭ mi povos fari ion similan. Mia kara sinjoro, mi dankas vin ankoraŭ milfoje.

Ambaŭ levas la manon por sin saluti kaj ĉiu daŭrigas sian promenadon...

Kontenta Karlo revenas al sia domo kun sia sako enmane. Li ne estas kontenta pro sia kolekto, sed ĉar liaj

gamboj funkciis sen ribelado. Venont-nokte li eble kviete dormos. Tiun vesperon, por ne tro frue enlitiĝi, li restas dum du horoj en sia ateliero riparante la motorsegilon kaj reakrigante ĝian ĉenon. Nur je la dekunua li enŝoviĝas en sian liton:

— Se mi povus havi bonan nokton, mi estus feliĉa! Mi tiom bezonas dormi!

Malpli ol dek minutojn poste, la unua averta-pafo trafas lin. Estas kiel eta pinĉado je la dekstra suro! Tia estas la kutima signo! Tiam ŝajnas al li, ke io, tordiĝante kaj produktante elektrajn malŝargojn, rapide moviĝas ene de kaj ĉirkaŭ liaj muskoloj. Instinkte, li iomete turnas siajn piedojn kaj la doloro silentas. Apenaŭ du sekundoj pasas, ĝis kiam la “aĵo” denove ronĝas lin, sed multe pli forte kaj pli profunde. Karlo estas devigata ree kaj ree moviĝi, ĉar ĉiufoje li estas same ekatakata. Ne eblas resti senmova! Pro tiaj strangaj doloroj tiu rara malsano malnovtempe estis nomata sindromo de la senripozaj gamboj. Nun revenante okupiĝi pri Karlo, ĝi tion faras, kvazaŭ ĝi reprenus sian servon. Ĝi furioze priserĉas sub lia haŭto! Nekapabla elteni tiun doloron pli longe, Karlo saltas el sia lito. Li rapide devas preni decidon: ĉu li piede rondiru en la dormoĉambro, pedalu sur sia hejma biciklo aŭ sin vestu por iri marŝadi laŭ la stratoj de la urbo ĝis tagiĝo, se necesas?

Li ŝaltas sian komputilon, elektas muzikon, regas la sonnivelon, por ke ĝi estu nek tro laŭta nek maltro laŭta, kaj surseliĝas sur sia biciklo, kvazaŭ estus ĉevalo. Dum li biciklas, la profunde varma voĉo de Kalizo (*Calise*) superante la muzikajn akordojn de la koruso “Voĉa Ateliero de Albio” (*Atelier vocal d'Albi*), kiu kantas la “Ĝeneralan kanton” (*Canto general*) de *Pablo Neruda* kaj *Mikis Théodorakis*, plenigas la tutan spacon de lia ĉambro. Kvazaŭ envultita, li lasas sin konduki per la voĉoj de la ĥoranoj. Li silente pedalas pli kaj pli rapide, tro rapide...

Ŝvito abunde elfluas el liaj vizago

kaj dorso. Li haltas por preni tukon. Aŭtomate li ekrigardas al la kontrola panelo. Ekranoj indikas tridek minutojn kaj naŭ kilometrojn tricent kvindek. Li aliris tro rapide! Li ne plu estas juna kaj tiel devas esti tre zorgema pri sia sano. Li decidas ripozi kaj duŝi sin.

Li longe staras sub la duŝo. Tiu defluanta akvo forportas malpuraĵojn de lia korpo kaj samtempe penetrigas en li novajn fortojn. Dum multaj jaroj li nur ricevis malbonaĵojn. La sorto ofte batis lin, sed li ĉiam rifuzis cedi. Anstataŭ tio, li ĉiufoje ĝin alfrontas okulojn kontraŭ okuloj. Estas nur iu plia atako kaj ĉiufoje li ĝin repuŝas...

Liaj gamboj ĉiam doloras lin, tiam li sin vestas, prenas sian ĉapelon, bastonon kaj silente, por ne vekti sian edzinon, li eliras. Malgraŭ la nokto aŭ eble danke al ĝi, promeni tiahore estas agrabla okupo certe pro tio, ke la stratoj estas malplenaj de homoj kaj aŭtoj. Regas nur mildeco kaj kvieteco. Kvietpaŝe, sen celo krom marŝi kaj ankoraŭ marŝi, li piediras laŭ la stratoj. Je la tria matene, li alvenas antaŭ la nove konstruitan kinematografian komplekson. Li pensas:

— Neimageble, kiamaniere nia mondo rapide evoluas! Pasintece en tiu kinejo, ni povis spekti nur malnovan filmon, kiu estis ofte dek jarojn olda. Hodiaŭ, ekde ilia anonco la novaj filmoj estas projektataj en ĉiuj kinejoj. Filmon mi ne plu povas rigardi, ĉar tiam mi devus sidi dum longa tempo kaj miaj gamboj tion ne akceptus sen akre sin venĝi. Je tia nokta horo la kinejo ne plu funkcias de longe, tamen mi povas rigardi, kio estas proponita sur la afiŝoj: La eta princo, Human, La Nova Testamento, La pordo de Anio... Sufiĉas por hodiaŭ! Iru plu!

Vojirante, li aŭdas aŭton, kiu ege malrapide alvenas ĉe lia dorso. Pli kaj pli la aŭto alproksimiĝas. Alvenante al li, ĝi ruliĝas ankoraŭ pli malrapide kvazaŭ por lin akompani. — Ĉiunokte okazas same! La patrolo de policanoj, ekvidante min, agas kvazaŭ mi havus ion strangan. Dum kelkaj minutoj ili ekrigardas min kaj akcelas, antaŭ ol malaperi ĉe la venonta angulo. Tiom ofte ili jam renkontis min, ke mi ne komprenas, kial ĉiufoje la policanoj tiom multe hezitas! Anstataŭ tio, kial ili ne alparolas min? Aliflanke, estas io pozitiva. Ni povas pensi, ke ni estas bone protektataj...

Nur je la kvara kaj duono, Karlo alvenas antaŭ la pordo de sia domo.

Liaj manoj tremas kaj li baraktas por malŝlosi la seruron. Fine post iom da strabado li povas eniri! Silente kiel kato li iras laŭlonge de la koridoroj kondukantaj al la kuirejo. Plezurege li trinkas plenplenan bovlon da kafo kaj frandas tranĉaĵon da pano kun butero kaj konfitaĵo, antaŭ ol engluti la sep pilolojn preskribitajn de lia kuracisto. Tiam li sentas sin tiel lacega, ke li aliras rekte al sia dormoĉambro por enlitiĝi. Kaj tiufoje li endormiĝas kiel gliro.

Ĉe sia kuracisto li ne longe restas. Pro la proceduro pri la medikamento "Mediator", lia kuracisto ne plu povas preskribi medikamenton, kiu ne konsistigas objekton de iu takso-protokolo pri la koncernata malsano kaj ricevis rajtigilon por esti enmerkata. Konforme al la proceduro, li irigis Karlon al neŭrologo. Jen resumo de tio, kion ĉi tiu diras:

— Neŭrologiaj malsanoj estas tiel nekonataj, ke ni blinde palpas por trovi la medikamentojn, kiuj estos la plej efikaj kaj la malplej malbonaj. Mi havas sperton pri tiu, kiu precipe bone funkcias. Tamen ni devas esti ege atentemaj, ĉar foje tio, kio helpas iun, povas malhelpi alian... Ĉu vi ĉiam pretas roli kiel kobajo?

— Se mi ne konsentus provi tion, mi havus nenian solvon. Mia vivo ne estas elporteblo! Mi evidente konsentas! Bonvolu!

— Ĉiutage vi havos diakilon de Neupro kaj Dicodin... Mi tuj transdonos ĉiujn informojn al via kuracisto, por ke li redaktu la preskribon...

Tiu medicinaĵo sufiĉe bone efikas. Denove Karlo sentas sin revivi. Li komencas retrovi guston kaj plezuron. Agi kiel la aliaj homoj sen iam perturbi la vivon de familianoj estas granda feliĉo por li. Li iras kun siaj genepoj vidi filmojn en la nova kinematografia centro kaj viziti la urban banejon. Li do faras ĉiujn tiajn aĵojn, kiuj estas partoj de la vivo kaj kiujn li ne plu faris de longe.

Bedaŭrinde, tiu sunplena periodo ne longe daŭras. Du monatojn poste revenas liaj nedezireblaj doloroj kvazaŭ por lin akompani denove. Tiufoje ili sin montras ankoraŭ pli malagrablaj ol antaŭe. Tiel Karlo maldormas dumnokte kaj dum la tago li ne povas sidi ĉe sia skribtablo aŭ komputilo sen tio, ke doloroj tuj ekatakas lin. Ili penetras en liajn gambojn kaj brakojn kaj torturas lin

sen iu ajn paŭzo.

Karlo biciklas, marŝas kaj rebiciklas, marŝas, sed tio ne solvas lian problemon. Li ne plu povas ripozi. Venas la momento kiam lia menso ŝajnas panei. Dum multaj sekundoj li povas stari senmove kun la okuloj fiksitaj antaŭ si. Tiam li plu nenion vidas, aŭdas aŭ sentas, kvazaŭ li estus en komato. Lia edzino timegas.

— Aliru tuj vidi vian kuraciston! Li devas vin ekzameni kaj doni al vi rimedon. Iru lin viziti senprokraste...

Sed Karlo nenion faras. Li scias, ke lia kuracisto ne havas solvon. Miraklon li ne scipovas fari. Lia malsano estas tro malbone konata. Estas tro malmulte da koncernatoj por interesi la farmaciajn firmaojn pri eltrovado kaj produktado de specifaj medikamentoj.

Okazas tago, kiu malbone komenciĝas. Pro nekomprenebla evento malnoblaj vortoj abunde defluas de la buŝo de la knaboj, kiuj kutime pace ludas surstrate. Aŭdante tion, kelkaj apudpasantaj gepatroj decidas interveni por trudi pafĉesigon. Sed ili mallerte faras ĝin. Sen scii la kialon de tia ribelado, ili forte subtenas siajn idojn, ĉar evidente ĉi tiuj estis bonaj infanoj, kiuj ne povas esti kulpaj je kanajlaĵoj. Sen ajna pripenso, al la aliaj ili kriaĉas:

— ...Sovaĝuloj, ĉu viaj gepatroj nenion instruis al vi? Ĉu ...

Sentante sin koncernataj, ankaŭ aliaj gepatroj enmiksiĝas. La afero kreskas kaj prenas alarmajn proporciojn. La infanoj, komprenante, ke ĉio malbone disvolviĝos, rapide forkuras. Plurestas en la batalo la gepatroj kaj Karlo. Li estas plenmeze de ili, ĉar ĉio okazis antaŭ lia domo. Li provis kvietigi la batalantojn, sed sukcesis nur ĉion gravigi. Iuj voĉoj diras, ke, se li ne estus veninta, ĉio jam de longe estus finita. Lia edzino aldiras:

— Vi estas tro rigida kaj volas ĉion regi. Kial vi ĉiam kuras, kiam viaj genepoj kverelas? Kiel kutime vi venenas ĉion...

La gefiloj de Karlo venis por tagmanĝi ĉirkaŭ la gepatra tablo, sed nun ege malkontentaj ili rapide foriras kun siaj idoj. En la mangoĉambro, la forgesitaj pladoj malvarmiĝas. Lia edzino daŭre grumbas:

— Kial! Sed kial vi metis vian nazon en tiun aferon, kiu ne koncernis vin? La infanoj ne plu venos kaj ni ne plu vidos niajn genepojn! Jen kion vi

gajnis...

Ne plu sciante kion fari, Karlo rifuĝas en sian dormoĉambron.

Tiel Karlo estas ne nur trafita de sanproblemoj, sed li ankaŭ ŝajnas esti ĉiufanke atakata. Kial? Klarigojn neniu havas. Estas nur fakto! Tamen li neniam intencis veneni okazantaĵojn, nur simple ilin kvietigi, sed ĉio neniam funkcias kiel ni tion deziras. Por eskapi el ĉio, li prenas sian saketon, kaskedon, bastonon kaj iras marŝi traŭbe.

Ne pensi... Nur marŝi... Kontraŭvole, en lia menso ideoj rondiras. Ĉio sin piedpremas! La kapo doloras lin. Eĉ sen tio, ke li tion rimarkus, liaj paŝoj kondukas lin borde de la lageto. Tie li sidas, kun la rigardo ŝajnanta enprofundiĝi en la grizan akvon, kvazaŭ por plu nenion aŭdi... Plu nenion vidi... Ĉion forgesi, kaj eĉ sian ekziston. Li longe staras tie senmove...

Ĉu nun estas la bona momento por meti finan punkton je tiu tro longa kaj tro postulema vivo, kiu estas lia? Horoj forflugas... Li staras senmove kun la kapo plena de dubo kaj la okuloj en ia nenieco...

Jam noktiĝas, kiam li revenas al sia domo. Neniu ŝajnas rimarki lian ĉeeston. Plu neniu parolas! Li silentas! La pordon de sia dormoĉambro li fermas malantaŭ si. La domo endormiĝas...

— Io ŝanĝiĝis hodiaŭ, diris Ema al sia edzo. Karlo ne prenis sian saketon! Eble li ĝin forgesis! Sed vi, vi devas scii, ĉar ofte mi vidis vin paroli kun li. Ĉu li diris ion al vi?

Sed la edzo nur movas la kapon dekstren maldekstren sen iu ajn vorto. Por li evidente estas interese daŭrigi la aferon. Ema bezonas scii ĉion pri ĉiuj. Ke ŝi restu sen respondo, estas por ŝi granda sufero kaj por li eta ludo.

Karlo alvenas ĉe la precize sama loko, kie li estis la antaŭan tagon. Kiel la antaŭan tagon, li longe rigardas la akvon, kvazaŭ li povus vidi en la profundon.

Estas tempo! Lia vizaĝo estas ripoza, serena. Malrapide li sin pretigas. Li demetas sian mantelon kaj li zorge ĝin faldas sur la verda herbo. Supre li deponas sian ĉapelon kaj bastonon. Jen ĉio estas preta...

La patrino krias al sia knabeto:

— Aldo! Venu tuj! Mi jam diris al vi, ke vi ne devas malproksimiĝi! Kie estas akvo, tie estas danĝero! Venu, ĉar ni devas foriri.

La knabeto, permane tirata de la patrino, pene trotas malantaŭ ŝi.

— Panjo, dirrruuuuuu... Ĉu la viroj iĝas fiŝoj, kiam ili maljunuliĝas? Diru al mi? Ĉu ili iĝis fiŝoj? Panjooooo...

Sed la patrino nenion aŭdas!

Kun la telefono gluita ĉe ŝia orelo, ŝi havas aliajn zorgojn...

ROGER CONDON

# La varma karno de l' vortoj



Raymond Queneau

Mi elektis tiun provokeman tekston, kiun Queneau skribis kontraŭ ĉiuj puristoj de “rekta skribado” (etimologie ‘Orto-grafio’).

En homamaso  
Zigzagiranta,  
Jen frenezulo  
Rekte marŝanta

Nekonata aŭtoro

## La varma karno de l' vortoj

La vortojn ekprenu, lertajn piedojn sentu [1],

Ankaŭ la korforton, same de hundego.

La felon karesu por lasi kviete.

Surgenuen metu, silentigu tute.

Kontraŭ la ronĝuloj [2], ŝirnu *Kademion*.

Faru niĉon al son', senutiliĝinta.

Krudaj oni pensas, sed envere feblaj,

Kaj la morto venas, oftege de sufok' [3].

Do tuj ilin metu en grandajn tombejojn,

Kiujn mokaj mensoj nomas la vortaroj,

Kaj mi, trista spirit', iel forpasejoj.

Nu kial do plori, pri ĉi vana fakto,

Klara elementa, kun fam' kaj potenco.

Ĉi vortojn prenu tuj, kaj la karnon [4] vidu!

RAYMOND QUENEAU, SONETOJ

Originala titolo 'La chair chaude des mots' ("La varma karno de la vortoj").

Esperantigis kaj komentis Ĝemil KSUS

Notoj:

[1] La esprimo estas dubsenca. En poeziarto la 'piedo' estas baza versero. Ĝi iel "dancigas" la verkon. Aliflanke la 'lertaj piedoj' pensigas pri homeraj herooj de la greka antikveco. "Senti" en la franca ("sentir") povas ankaŭ signifi "flari" ... la lertajn piedojn... Ĉiu elektu !

[2] "Ni (la junaj Marx kaj Engels), des pli volontate forlasis la manuskripton al la ronĝa kritiko de la musoj, ke ni atingis nian ĉefan celon, klarvidi en ni mem" (Marx, 1859). Marx tiuteme elvokis la manuskripton de la 'Germana Ideologio' (1845). Indas noti, ke ambaŭ iniciatoroj de la markisma skolo estis grandaj kritikemuloj.

[3] "Malbone brakumas, ki tro ofte kisas" (kiel diris mia praavino)... la vortarojn interalie...

[4] Varianto ebla: "kaj la 'k-E-rnon' vidu".



# Prikultura debato

“Ja kulturo estas samkiel marmelado, ju malpli oni havas, ĝin oni des pli sternas”, skribis mi (Sulo 3/4). En sia rebato en la sekva Sulo, Serĝo Sir’ skribas: “Pri kulturo, alia famkonata samspeca humuraĵo diras la malon, komparante kulturon kun paraŝuto: ‘Kulturo similas paraŝuton: kiam mankas, oni « frakasiĝas »/« rezignas paroli » (Fr: s’écramer)’”.

Rilate tiun interesan alegorion de la manka paraŝuto, mi prefere tradukus, “oni ‘kraŝas’”. Fakte en la franca, “s’écramer” estas dubsenca, unuflanke signifante “kraŝi” laŭvorte (aŭ “sin displiti”). Kiam alparolanto ordonas al vi: “Ci krasigû”, tio estas senapelacia: vi devas tuj “ekfermi vian faŭkon”... kaj do silente lasi la aliulojn (implice “klerajn”) paroli.

Petro Levi proponis prie la ja pli trafan “oni humiliĝas”. De kiam oni scias, ke ‘humiliĝi’ estas etimologie “proksimiĝi al humo” (grundo), eĉ “eniri humon”, la metaforo prenas sian plej elokventan senson. Ni imagu desegnofilmon de Tex Avery. Tia frakasa surteriĝo-humiliĝo, bone akordiĝas aliflanke kun la malnova civiliza malestimo al kamparanoj.

Kiam oni ne havas kulturon resume, ĉu oni diskrete retropaŝas, silente aŭskultante la (t.n. ‘klerajn’) aliulojn, ĉu oni antaŭenfuĝas senfine vortumante eĉ vortludante... Ni do estu dankema al Serĝo, kiu levis tiun interesan antinomion.

NB. Mi ne volas tro “sterni mian marmeladon” kaj do ne rebatos al la ĝentila figuro de la pavo kun la sugesto, laŭ kiu mi “eble spertus bezonon montri ke mi konis tiun ŝercan komparon” (de Françoise Sagan), sekve ke mi laŭdire “falas en la kaptilon provi traduki netraduk-eblaĵon”. Mi nur lasos al miaj nefranc-lingvaj kamaradoj la zorgon diri laŭbezone ĉu mia traduko estas “nekomprenebla” (verŝajne “perfida” kiel ĉiu traduko). Daŭrigonte la temon “kio estas kulturo”, mi ne intencas fali en la kaptilon de la fama leĝo de Tonjo, kie mi timas ke Serĝo denove troviĝas.

ĜEMIL KSUS

## SUDOKCIDENTA FRANCO: HISTORIO DE LOKAJ LABORISTOJ

# Striko de la rezinistoj

Bildo pri Landezio, regiono animata de ŝafistoj sur iliaj stilzoj kaj de rezinistoj piede de la pinastroj, bele vivas en nia kolektiva memoro. La ŝafistoj kaj ŝafistinoj, alte starantaj sur lignaĵoj, super la arbustoj, por kviete varti sian ŝafaron dissemitan inter la filikoj, kiam alvenas la inĝeniero Ĉambrelant’ (Chambrelent). Ĉirkaŭ 1850 ĉi lasta transformigas la sablan ebenaĵon per drasta plantado de vastaj pinaroj. La ŝafistoj, unuaj kontestantoj en Alta Erikejo, kontraŭas tiun arbaron, kiu forpelas ilin. La lastan frapon donas la Secesi-milito en Usono, kiu dek jarojn poste subite revalorigas la rezinokurzojn. Tiam la aŭtoritatoj decidas, ke la landezia pinastraro devas produkti unue rezinon! Ofte la ŝafistoj bruligis la freŝe plantitajn arbetojn, tamen iom post iom ili devos rezigni kaj lasi la lokon. Ili eĉ mem fariĝos rezinistoj por plu perlabori sian vivon.

De tre longa tempo vivadas rezinistoj en Landezio. En la fruaj tempoj la rezinon oni rikoltis en trueto fosita en la sablo, sur sternita musko, piede de

la arbo. Ĉirkaŭ la 1840a jaro bordoza advokato, laŭ ideo de landezulo, patentigas la terpoton, kiel rikolto-rimedon, cele al pli pura rikolto kaj pli alta kvalito de la rezino. Samepoke ankaŭ la distilado pliboniĝas dank’ al sistemo inventita de landezia apotekisto. Tiu intensiva rikoltado igas Francion la dua rezinproduktanta lando en la mondo, unua en Eŭropo. La posedantoj de la pinastroj pliriĉiĝas sed ankoraŭ pli sisteme ekspluatados la rezinistojn, partlaboristojn. Ties ribelo estos endemia. Jam ekde 1863 alfrontoj eksplodas en la vilaĝo Sabro (Sabres). Tie pluraj rezinistoj estas arestitaj kaj kondamnate senditaj en karceron. La imperiestro Napoleono la 3a ordonos ilian liberigon.

En 1902 la rezinvaloro ekkreskas kaj konstante progresos. 340-litra barelo, kiun eblis negoci kontraŭ 30 frankoj en 1904, valoras 100 kaj eĉ 120 frankojn en 1906! La partlaboristoj opinias, ke ili rajtas revii pli bonan estonton. Ili kredas je agnosko de la valoro de ilia peniga laboro. Sed kvankam la vendoprezo kvarobliĝis,



La 9an de marto 1906 en la landezia vilaĝo Lesperono forta striko mobilizis la rezinistojn, kiuj ekluktis por postuli pli bonan partigon de la riĉaĵoj ricevataj de la rezinindustriistoj.

ilia propra parto ne varias. Fakte ili tiel nur ekkonscios pri la troigoj de la posedantoj de la pinastraroj, kiuj rifuzas partigi sian profiton. Kaj la esperoj de la rezinistoj neniĝas.

En 1906 multaj sindikatoj aperas en Francio. La unuajn kaj la plej gravajn kreas la rezinistoj en nia regiono. Protestado kunordiĝas kaj instituciĝas. Tiam la rezinistoj, ŝatantaj sian metion, grupe organizitaj, kuraĝas depostuli dignecon de sia laboro kaj naturajn dezirojn al plibonigo de siaj personaj kaj familiaj vivoj. Tiel interhelpo organiziĝas. La tre aktiva socialista partio (SFIO – Sekcio Franca de la Internacio Laborista) grupigas plej multajn sindikatistojn en la sudokcidenta regiono.

La unua sindikato estas kreita en decembro 1905 en la ĉeoceana vilaĝo Litemiks' (Lit-et-Mixe). Tuj sekvas la najbara Marenseno (Marensin) komence de la jaro 1906. Tiel disvolviĝas grandaj strikoj ekde februaro 1906. Ili daŭros ĝis la posta jaro 1907. La unua ekde marto-aprilo 1906 ekestas en la nordokcidenta parto de Landezio. Ĝi rapide etendiĝas al pli sudaj lokoj komence borde de la oceano. La plej grava striko okazas en la vilaĝo Lesperon. Ĝi ekflagras la 5an de junio post kondamno de kelkaj partlaboristoj je ses monatoj da karcero kun prokrastopermeso. La inter 30.000 kaj 40.000 rezinistoj, tiam laborantaj en la multnombraj pinastraroj, uzas principon de

turniĝanta strikado, kiu malstabiligas la aŭtoritatojn. Tiuj strikantoj ĝuas nekontesteblan atuton: ili povas interrompi sian profesion aktivadon sen iel damaĝi la profitodonan arbaron. Tamen ĉesigo de laborkontrakto povas rajtigi senlaborigon aŭ intervenon de polico- aŭ arme-fortoj. Efektive ĝendarmoj kaj soldatoj rekviziitaj alfrontos viglajn batalojn. Fluos sango de viktimoj. Malgraŭ la gravaj elmetitaj riskoj, striko ĉefrolas por politika kaj socia vivo en Francio dum la tuta periodo de la Tria Respubliko (1870-1940).

En printempo 1932 la rezinistoj de la komunumaj pinaroj ĉirkaŭ la vilaĝo Capbreton postulas salajraltigon. 83 rezinistoj demonstracias en la apuda urbeto Hossegor. Ili fine sukcesas ricevi 20%an plivalorigon por ĉiu rezinbarelo dank' al komunista elektito de la najbara vilaĝo Soors. Sekve fama demonstracio en 1934 kunigis en la Landezia ĉefurbo Mont-de-Marsan preskaŭ ĉiujn rezinistojn.

Tre severaj strikoj fervoras ĝis ĝenerala striko dum tuta monato en 1937. Tiam fine, la troteditaj posedantoj konsentas malfidoplenan debaton kaj sensignifan modifeton de la statuto de la partlaboristoj. Tiaj lokaj strikoj daŭros dum jardekoj. La lastaj movadoj okazos dum la 1970aj jaroj, kiam modernigo de la rezinrikoltado trudas praktikon per injekcioj de sulfura acido kolektanta rezinon en plastaj saketoj. Jen fia forĵeto de ĉiuj bezonataj konoj kaj lerteco, kiuj fierigis bonan reziniston.

La sociaj antaŭenpaŝoj estis tre malrapidaj. En 1936 la vilaĝestro en Capbreton asertas, ke la komunumaj servoj dungas neniun sindikatanon. Nur en 1968 kolektiva konvencio reguligas la profesion. La troigoj estas hipokrite kaj oficiale denuncitaj, tamen tro malfrue. Jam tiam estas programita la malapero de la metio. La ŝtato kaj la pinar-posedantoj, kiuj riĉiĝis dank' al rezino, kaŝe decidis alian orientiĝon por la gaskona pinastraro. Ĝi de tiam estos paperfabrika. Kapitalismaj entreprenoj, kiaj Saint-Gobain aŭ Les Papeteries de Gascogne, finance argumentas kaj ĝuigas la posedantojn, kiuj pretas samtempe akumuli novajn monenspezojn kaj



malaperigi tro maloportunajn rezinistojn. Tiel pro la nova destino de la pinastroj al paperindustrio, la nombro de rezinistoj iĝas 472 en 1977, 223 en 1983 kaj fine 76 en 1989. En 1990 ĉiuj definitive malaperis.

Samkiel la ŝafistoj, la rezinistoj, tiel intime ligitaj al la landezia historio, entute malaperis el la pejzaĝo en kvazaŭĝenerala indiferenteco.

ANNE-MARIE BELLENGUEZ

Tradukita de Marcelo Redoulez





25 JAROJN POST LA FORPASO

# Josip Vajdliĥ (Weidlich)

“La morto estas en forgeso, kaj ne en la fakto de la morto mem; Homo estas vere morta, kiam neniu rememoras lin.” [1]

Al mia generacio kaj al multaj montgrimpantoj kaj esperantistoj, speciale el la societo “Naturamiko”, kiam oni mencias la nomon de Joĵa – Zorgulo, tuj alflugas multaj bildoj kaj rememoroj. Li titolis min “mia esperanto-adepto”, li instruis al mi esperanton laŭ la lernolibro de Dušan Maruzzi, kaj mi konfesu, ke mi speciale tuŝas ondoj da rememoroj. Bedaŭrinde, pro sia malsano li instruis nur la unuan lecionon.

Joĵa estis la spegulo de la esperantisteco, de la naturamika movado, kies emblemo estas du manoj kun blanka kaj blua manikoj, kiuj kune tenas blujajn kvinfoliajn florojn de la internacia laborista montgrimpa turisma kaj esperantista societo “Naturamiko”. Lia amo por laboristaj kaj naturamikecaj atingoj kaj celoj estis la tegmento, la kovrilo por ĉio alia. Tio inkluzivis la SAT-organizaĵon, la montkabanon de “Naturamiko” sur la “Glavica”, situanta ĉe la okcidenta deklivo de nia monto Medvednica. La laboristan bibliotekon kaj esperantobibliotekon li gvidis kaj prizorgis tre serioze.

Li estis unu inter la maljunuloj, ho ve, tiam proksimume kvardek-kvindek jarojn aĝaj en la societo “Naturamiko”, kiuj nian grupon akceptis per malfermitaj manoj. Ni estis tiam dudekjaruloj, kaj la onidiro fluas inter membroj kaj societo de la Kroatia Montgrimpa Unuiĝo, ke ni alportis “novan spiriton” al malnova eŭrope konata societo. Por la grupo de junuloj, por kiuj ne ekzistis plu ebleco labori en la kadro de la organizaĵo de la Kroatia Ruĝa Kruco post la eniro en la societon “Naturamiko”, estis bona ŝanco, ke la tridek-kvardeka grupeto da gejunuloj restu kune kaj kuntravivu ĉion alportatan el la ruĝkruca “terena unuo” en kaj la novan ĉirkaŭaĵon kaj la novan societon. Estis tio ankaŭ feliĉa evento por malnova montgrimpa societo kun longa tradicio.

La societo “Naturamiko” permesis al iamaj ruĝkruccanoj uzi ĝiajn modestajn subnivelajn ejojn en la Laborista Domo en Zagrebo. Kaj ne nur tio! Joĵa, kiu zorgis pri multaj aferoj, kiuj tuŝas la societon, kun Franjo Vokoun kaj aliaj, tuj donis al ni monon por diversaj celoj. Oni tuj aĉetis novajn skiojn kun modernaj suprenkurbitaj ekstremaĵoj. La grupo desegnis kaj konstruis tendojn laŭ propraj ideoj kaj prilaboris detalojn, por ke la tiama fama sport-entrepreno prilaboru tendojn.

Sekvis tuja plenvasta aktivado, kiun plenkore subtenadis nia Zorgulo. Ĉiuj societanoj puŝadis nin por ĉeesti kaj partopreni en diversaj okazaĵoj en la Respubliko kaj en eksterlando. La grupo rebruligis la flamon de gloro de la elstara societo inter antaŭmilitaj montgrimpantoj kaj esperantistaj societoj. Kaj ne nur tio! La membroj de la societo anonciĝis ĉeesti kaj partopreni respublikan konkuradon en t.n. “alpaj sportoj”. Venintaj al la starto oni aŭdis primokadon, ĉar la membroj venis vestitaj kaj ekipitaj per malnovaj ŝuoj kaj vestaĵoj, speciale “pumpantalonoj”. Nu, la rezultoj estis modestaj. Jes, sed viraj kaj virinaj teamoj kelkfoje venkis en montgrimpa orientiĝa konkurado per kompasoj super montoj. Joĵa iom post membriĝo proponis, ke la membroj vizitu la plej altan pinton de Montenegro sur la monto Durmitor, kie oni devis trovi spurojn de vizito de Naturamikaj vizitintoj antaŭ la Dua Mondmilito. Kaj estis tiel. Zorgulo de tempo al tempo puŝadis junajn membrojn iom plu montgrimpi. Sekvajare tio okazis trans la mezbosniajn montarojn kaj lagon de Jablanica, kio finiĝis per boatado tra la rivero Neretva ĝis Mostar. La tiama malbona telefona situacio tamen ne haltigis kontaktojn kun Joĵa kaj peradon, ke li iel kolektu por junaj montgrimpantoj – iom da mono.

Esperantista sekcio, kiu konsistis el minimume dekkvin membroj, ankaŭ aldoniĝis al la famo de la societo. Interalie, ili ĉeestis en 1962 ĉe la viena kunveno de esperantistaj Naturamikoj,

kie ili amikiĝis kun la multjara funkciulo de la naturamika movado Max Finkenzeller.

Nu, sekvas kelkaj biografiaj informoj pri Josip Vajdliĥ. Li naskiĝis en Novi Marof en februaro 1907 kaj mortis en Zagrebo decembre de la j. 1988. Post sia edukado kiel elektrikisto li fariĝis bibliotekisto en Laborista Biblioteko en Zagrebo, kie li laboris ĝis la emeritiĝo. Li estis kunfondinto de la Kroatia Esperanto-Ligo kaj la Esperanto-societo “Bude Borjan” en Zagrebo. Kiel administranto kaj kasisto de la Jugoslavia Esperanto-Federacio kaj la revuo La Suda Stelo li funkciis ĝis 1953. Li estis peranto de SAT ĝis 1963. Lia merito estas, ke la Laborista Biblioteko en Zagrebo kreis Esperanto-fakon kun ĉirkaŭ sescent diversaj Esperanto-libroj. Oni povas trovi liajn artikolojn en La Suda Stelo, Sennaciulo de SAT kaj Jugoslavia Fervojo. Li estis komitatano de la Fervojista Esperanto-Societo en Zagrebo, de la Kroatia Esperanto-Ligo kaj de la Jugoslavia Esperanto-Federacio. En 1953 li estis LKK-ano de la Universala Kongreso okazinta en Zagrebo.

La filo de Joĵa, karesnome Daĉjo (originale: Damir), estis denaska esperantisto, kiu bedaŭrinde neniam havis volon aŭ tempon pli eniri en naturamikajn aŭ esperantistajn rondojn.

Oni devas bedaŭrinde ĉe tiu mallonga teksto skribi kelkajn malĝojajn pripensojn. Malgraŭ lia longjara kaj enhavoplena fervora kaj sindona laboro kaj vivo, nenion oni povas trovi pri li en la arkivo de la SAT-organizaĵo aŭ en la retejo de la Kroatia Montgrimpa Unuiĝo.

RADENKO MILOŠEVIĆ

[1] Frano Alfirević, kroata poeto, eseisto, tradukisto kaj vojaĝpriskribisto.

La biografiaj informoj: Pleadin, Josip: *Biografija leksikono de kroatiaj esperantistoj*, 2002.

# Lilio Grandière (1920 - 2016)

En la sudfranca vilaĝo Balaruc, borde de la laguno Thau, kie la geinstruistoj Lentaigne organizis la renkontiĝon, tiam, tuj post la fino de la Dua Mondmilito, kiam libereco, paco kaj espero renaskiĝis tra la mondo, sub la mediteranea ĉielo kaj la Zamenhofa verda stelo, du junuloj kuniĝis, Lilio kaj Rolando.

Li mortis en 1998, ŝi ĵus forpasis, la 4an de aŭgusto 2016. Unu paro, du vivoj trapenetritaj de la esperantista kaj sennaciista idealoj.

Kune ili dediĉis multon de sia vivotempo favore al Esperanto, ĉe SAT kaj SAT-Amikaro. Post la morto de Rolando, Lilio eniris la Plenum-Komitaton de SAT, ĉeestis akurate la laborkunsidojn – eĉ malfruajn. Dum pluraj jaroj ŝi deĵoris en la pariza sidejo de SAT-Amikaro, informante la scivolemulojn pri nia komuna lingvo.

Pro la longtempa partopreno en la E-kongresoj de la geedzoj Grandière,



SAT-Kongreso en Vieno (1962). Rolando, Ĵeĉjo kaj Lilio sidas sube kaj dekstre

multaj kamarad(in)oj rememoros la ĉarman ridemon de Lilio... Ĉi lastajn jarojn ŝi vivis en maljunulejo proksime de sia filo. Mirinde ŝi konservis, malgraŭ multaj handikapo, sian optimismon, ankaŭ firman konvinkenergion: la flegistinojn kaj personaron

de la institucio ŝi daŭre klopodis varbi al sindikatismo kaj Esperanto.

Dankon Lilio!

LÉA, GINETTE CHEVOLAT, BRASIKETO

GÉRARD GRANDIÈRE, ĴEĈJO

## Reago al la recenzo *La bunteco de anarkiismo en Hispanio* (1)

(Ĉi artikolo de Miguel Fernández aperis en la n-ro 25 de la revuo *Beletra Almanako* (BA), kies redakcio permesis al ni publikigi ĝin en *Sennaciulo*).

En BA-24, sub la titolo *La bunteco de anarkiismo en Hispanio*, aperis recenzo far Ulrich Lins pri la libro *Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo*, eldonita de SATeH (SAT en Hispanio), kie legeblas tekstoj



Anselmo Lorenzo

de mi kompilitaj, elhispanigitaj kaj komentitaj.

Principe mi ne kutimas reagi al recenzoj pri miaj verkoj. Ne malofte mi mem praktikas la tiklan taskon recenzi kaj konscias, ke, kiel ajn recenzanto volas objektivi, ne ĉiam li (ŝi) sukcesas teni sin ekster siaj (mal)ŝatoj, (mal)emoj, (mal)amoj kaj (mal)antaŭjuĝoj. Sed, ĉi-okaze, antaŭ Lins'a aserto tuŝanta historian faron kaj prenebla kiel facilanima translimiĝo devenanta pli el la galveziko ol el la kapo, mi ne povus silenti.

La libro konsistas el omaĝo al, ĉefe, du eminentaj anarkiistoj kaj grandanimaj homoj, Anselmo Lorenzo kaj Max Nettlau, kaj parto de doktora disertacio, kie priskribatas la rilatoj inter la hispana anarkiisma movado kaj la planlingvoj, ĉefe Esperanto kaj Ido. La omaĝojn aŭtoris la historia hispana liberecana aktivulino Federica Montseny (1905-1994); la doktoran disertacion, la nuntempa hispana historiistino Dolors Marin, kiu regalis nin e-istojn per valora studo farita science, kontraste kun la ĉe ni kutimaj

amatoraĵoj – kun respektindaj esceptoj – sur la historia tereno.

Legante la Lins'an recenzon, min tre surprizis i.a. lia mencio pri absolute nemenciinda kaj flanka afero: « La nomo de Marie Hankel, en 1909 premiita “Reĝino” de la Internaciaj Floraj Ludoj en Barcelono, estas misskribita » (Marin skribis – kaj mi transkribis – “Hankell” anstataŭ “Hankel”). Tamen, en sia recenzo, unuarangaĵon, kiel estas la nomo de Anselmo Lorenzo, la homo, al kiu SATeH dediĉis la libron, Lins ne misskribas, sed, eĉ multe pli grave, ŝanĝas. Li parolas ne pri “Anselmo”, sed pri “Antonio” Lorenzo. Komentoj superfluas.

Ie tie, en la recenzo, legeblas misinterpretoj kaj rebatindaj asertoj, pri kiuj mi tute ne okupiĝos. Temas pri lia persona kompreno de la libro. Mi traktos nur lian plendon ĉe la fino: « Jen kaj jen estas aludite al la uzo de bomboj kaj pistoloj fare de anarkiistoj, sed la masakrado de katolikaj pastroj antaŭ kaj post la ribelo de Francisco Franco, pri kiu kulpis t.n. revoluciuloj,




**Federica Montseny**

ne estas menciita. Eĉ se ĝin multe superis la frankista dimensio de sangoverŝado, nepre decas memori pri ĉiuj, kiuj iĝis viktimoj en la “hispana tragedio” ».

Kaj jen mi respondas al Lins: unue, ke decas memori pri ĉiuj viktimoj de la “hispana tragedio” en verko pri la “hispana tragedio”, ne en ĉi libro, kies ĉeftemo alias. Imagu, ke mi recenzas esearon, kie priomaĝatas la figuroj kaj verkoj de Tereza de Kalkuto kaj la papo Johano la 23a kaj, krome, prihistorias la rilatoj inter esperantismo kaj katolikismo. Kaj imagu, ke mi plendas, ke en ĝi oni ne kondamnas la multajn masakradojn kaj genocidojn faritajn de katolikoj laŭlonge de la historio. Evidente, mi translimiĝus. Mi lokus min ekster la temo.

Due: se la oligarkio, surbaze de perfido far ĝia armita fako, la armeo, kaj la beno kaj ĉiuflanka helpo far ĝia spirita fako, la katolika eklezio, ne puĉintus kontraŭ la laŭleĝan Duan Hispanan Respublikon, la “hispana tragedio” kaj la sekvaj 40 jaroj da krima naci-katolikismo ne havintus lokon.

Trie: la hispana liberecana movado



**Max Nettlau**

kiel tuto ne adoptis la praktikon “propagando per la fako”. Kiel mi klarigas en diversaj notoj, la bomboj kaj pistoloj, pri kiuj oni parolas en la libro, estis uzitaj de anarkiistoj, kiuj agadis persone, individue kaj propraniciate, plej ofte por venĝi kanajlaĵojn faritajn de la potencularo (kio, cetere, ne signifas, ke mi defendas tiuspecajn venĝojn). En la dudekaj jaroj, en Barcelono, laboristoj devis uzi pistolojn por reagi kontraŭ la sikariojn de la mastraj t.n. “liberaj sindikatoj”, kiuj pistol-en-mane ekstermendis engaĝintajn laboristojn kaj konatajn anarki-sindikatojn. Se ne paroli pri la agado de la tragike fama milita guberniestro de Barcelono, generalo Martínez Anido, kiu sisteme igis tiajn sikariojn ĵeti aŭ loki bombojn por kulpigi la anarkiisman movadon kaj tiel havi pretekston por efektiviĝi siajn famajn raziojn kontraŭ anarki-sindikatojn. Ĉion ĉi mi ne elpensis. Ĉio ĉi estas elementa historio de Hispanio.

Iel aŭ alie, kulpigi la tutan hispanan anarkiisman movadon pri masakrado de katolikaj pastroj pro tio, ke, nome de la anarkiisma revolucio, fiuloj mortigis sacerdotojn, egalus kulpigi la tutan islanaron pri la barbaraĵoj de sencerbuloj agantaj nome de Dio. Kontraste kun tio, la plejmulto el la masakradoj fare de katolikoj ja estis plenumitaj institucie, t.e. kun la kono, la subteno kaj la benoj de la papo kaj de la altaj religiaj instancoj. Por ne fari eterna ĉi skribaĵon mi limiĝu je nur kelketaĵoj el la abundaj historiaj momentoj, kiam la “Sankta Patrino Eklezio” uzis terorismon praktikante kaj/aŭ benante masakrojn.

Ni retroiru al la jaro 1209 kaj al la franca urbo Béziers. La papa legato Arnaldo Amalriko sieĝas la urbon kaj ordonas siajn homojn eniri kaj detrui la albigensojn en ĝi rifuĝintajn. “Kiel rekoni la ortodoksajn kristanojn disde la albigensoj?”, Arnaldo demandatas. Jen lia respondo: “Mortigu ilin ĉiujn, ke jam poste la Sinjoro vidos, kiuj estas la liuloj”. Laŭ raporto far Arnaldo mem al la papo Inocento la 3a, nome de kiu li agadis, dudek mil urbanoj estis armile mortigitaj sendepende de la sekso kaj la aĝo. Albigensoj aŭ ne, ĉiuj dudek mil estis kristanoj. Kaj tiel, tiu krima papo sukcesis mortigi en unu sola tago kaj en unu sola urbo dek- aŭ dudek-oble pli da samreligianoj ol la romiaj imperiestroj en la tiel nomata “epoko de la martiroj” laŭlonge kaj



**Martínez Anido**

laŭlarĝe de la Imperio.

Paroli eĉ se nur resume pri la torturoj kaj krimoj far tia koŝmaro nomata Sankta Inkvizicio igus nin konsumi multajn paĝojn. Sed mi pensas tion nenecesa. Ni ĉiuj scias, kian plagon tiu terorisma katolika institucio signifis por la homaro kaj kian kanceron por la scienco kaj la kulturo, nome por la civilizacio. Oni kalkulas, ke per la Krucmilitoj kaj la Sankta Inkvizicio la katolika eklezio masakris multajn milionojn da homoj. Eĉ se nur pro tio, la ĉefa nuntempa tasko de tiu mezepoka organizo devus jeni: petadi la homaron pri pardono.

Ni haltetu en epoko pli proksima al ni. La 11an de februaro 1929, la papo Pio la 11a subskribas kun Benito Mussolini la Lateranan Traktaton, kiu agnoskas la ekziston de la papa teritorio kaj starigas la kreon de la vatikana ŝtato. Kia ago, tia pago. La papo petas la katolikan tendaron apogi la faŝisman opcion kaj benas la Mussolini’ajn tankojn, kiuj startas el Italio por invadi Abisenion kaj masakri abisenojn.

MIGUEL FERNÁNDEZ

(Sekvo en la venonta numero de *Sennaciulo*)



**Pio la 11a**

# Pri atomruboj

Kiam potenculoj decidis sen konsulti la popolojn konstrui atomcentralojn, neniu solvo por sendanĝerigi la rubojn ekzistis, sed oni pensis ke sciencistoj iam trovos solvojn, ĉu forsendi ilin en spacon, ĉu ĵeti ilin en marojn, ĉu bruligi ilin, ĉu fabriki novajn armilojn, ĉar la historio de atomenergio tre ligiĝas kun tiu de atommilito.

Dum la sesdekaj jaroj pli ol 14.000 tunoj da atomruboj estis forĵetitaj en Atlantiko.

La unua leĝo en Francio, proponita de Christian Bataille en 1991, fiksitis tri esplorvojojn: stoki la atomrubojn je la surfaco de la tero, stoki ilin profunde sub tero, aŭ transformi ilin por ke ili ne plu danĝeru.

Tiu franca leĝo estis modifita en 2006, post laŭdira publika debato, konfirmante esplorojn pri enterigo de la atomruboj. Pasintan Julion en Francio, la deputitoj voĉdonis ke la ege radioaktivaj atomruboj estos enterigitaj en Buro (francielingve: *Bure*), vilaĝo kiu situas je la limo inter Ĉampanjo kaj Vogezoj.

Tamen tiu decido ŝajnas hastega kaj tute ne respondeca. Ĉar la kondiĉoj de sekureco pri tiu stokado, pli ol 400 metrojn profunde en argila tavolo ne estas fidindaj. Ekzemple povus formiĝi gaso, kiu povus eksplodi same kiel en la stokejo WIPP (Usono, Nova Meksikio) en 2014. Aŭ akvo povus iom

post iom eniri la petron, tiel ke la puttavolo estos poluita.

La principo de la profunda enterigo de la ege radioaktivaj atomruboj estas stoki ilin en alveoloj fositaj en galerioj el argilo, poste ŝtopi ilin, kaj oni fidis la likimunecon de la petro por haltigi la radioaktivecon kiam la bareloj ne plu utilos.

Ankaŭ gravas la problemo de la memormastrumado: kiel transdoni al venontaj generacioj la informojn pri enterigo pli ol 400 metrojn profunde de ege danĝeraj materialoj dum milionoj da jaroj?

Ni jam havas tro da atomruboj, la plej saĝa decido estus ĉesi produkti ilin. Ni tuj haltigu atomcentralojn kaj ni nepre ne plu konstruu novajn.

Enterigi atomrubojn sub la teron en Buro ne estas solvo, sed nur krima kaŝado por trudi, por kredigi al la popolo ke solvo ekzistas. Tiel oni povos vendi novajn atomcentralojn ĉu al Britio, ĉu al Finnlando, ĉu al Ĉinio.

En Buro ekzistas internacia rezistado. Homoj el Germanio, Italio, Nederlando, Svisio, Japanio, Britio, Aŭstrio, Aŭstralio partoprenas en la lukto.

Venu tien kaj vizitu ilin ĉe la domo de la rezistado.

Ni ne permesu detrui arbaron nek polui teron kaj akvon dum miloj, milionoj da jaroj, nek en Buro, nek aliloke!

ANINO GRIFON



# 10 bonaj kialoj por ne iĝi vegano

lom da humuro en tiu mondo de (interalie karnisma) perforto

## 1. Esti vegano, jen io ne natura.

Homoj devas forĵeti ĉion, kio ne estas natura: ŝuojn, dentobrosadon, librojn, globkrajonojn...

## 2. Ni bezonas uzi bestojn, nepras por supervivado.

Veganoj provos diri al vi la malon, sed malprave. Ni havas vivbezonojn pri uzado de bestoj, samkiel ni havas vivbezonojn pri posedado de sunenergie funkcianta elektra kovertmalfermilo, de sendrata panrostilo kaj de lasera banansenŝeligilo. Temas pri supervivado.

## 3. Etiko estas subjektiva.

Etiko dependas de vidpunkto, do ne eblas diri ke manĝi bestojn estas malbone. Aŭ ke bruligi domon de sia najbarino estas malbone. Aŭ ke fortranĉi fingrojn de sia leterportisto estas malbone. Ĉio tio estas tre subjektiva.

## 4. Manĝi bestojn estas tradicio.

Efektive; ni ne ŝanĝu la regulojn. Samkiale inoj estas propraĵo de viroj kiuj ne rajtas surmeti pantalonon. Ni protektu niajn tradiciojn.

## 5. Veganismo profunde ŝanĝos la fundamentojn de nia socio.

Homoj ne povas adaptiĝi al sociaj ŝanĝoj. Tial homa sklavizado daŭre estas laŭleĝa, tial eblas senkapigi sen antaŭa proceso.

## 6. Ĉiuokaze, neniam la tuta mondo veganos.

Samkiel neniam la tuta mondo liberos je rasismo, seksismo aŭ gejo fobio! Ni do estu speciismaj, rasismaj, seksismaj kaj gejojofobiaj.

## 7. Manĝi bestojn kreas laborpostenojn.

Samkiel tabakindustrio aŭ militcela armilvendado, ekspluatado de bestoj kreas multe da laborpostenoj; do endas protekti nian ekonomion, gravas.

## 8. Natura tofuo estas malbongusta.

Dum kruda kaj natura kokina peco, jen io frandega.

## 9. Veganoj estas ege malafablaj.

Samkiel ĉiuj tiuj, kiuj permesas al si diri al ni ke ni estas seksismaj, nur ĉar ni diras ke inoj estas subuloj kompare al viroj kaj ke ili ne devus havi samajn rajtojn. Kiom da agresemo!

## 10. Se homoj havas kaninojn, tio estas por manĝi bestan karnon.

Cetere, se virhomoj havas cicojn, tio estas por mamnutri siajn bebojn; kaj se strutoj havas flugilojn, tio estas por flugi. Logike.



Elfrancigita far Markovo-Vito 35521

Grafika materialo disponigita de vegana ilustristo Florence Dellerie

(Florence Dellerie):

<https://www.facebook.com/florencedellerieillustration>



# Prezento de Bohemiaj lumoj en madrida teatro

La pasintan 19an de marto prezentiĝis *Bohemiaj lumoj*, mia esperantigo de Luces de bohemia, en konata alternativa teatra spaco de Madrido, la salono Kubik Fabrik. Ni celis ĉefe neesperantan publikon. Al la madrida esperantistaro jam en du pli fruaj okazoj mi prezentis la verkon. Unuafoje, kadre de la pasinta Zamenhof-tago, kiam, malgraŭ niaj klopodoj ĉe la presejo, la libro ankoraŭ ne estis vidinta la lumon. Duafoje, en la sidejo de HEF (Hispana Esperanto-Federacio), nur kelkajn tagojn poste, la 21an de decembro. Tiam, kun ekzemplero de la libro enmane – fine! – mi povis, krom malkovri al niaj geamikoj la ĉefajn ŝlosilojn de la verko kaj la tradukajn malfacilaĵojn en ĝi, voĉlegi al ili ĝian Dekan scenon.

Sed ĉi-okaze ni volis fari plian paŝon. Ni konsideris oportuna prezenti nian libron al la publiko ekstera al Esperantujo. Temas pri ĉefverko de Ramón María del Valle-Inclán kaj de la literaturoj hispana kaj eŭropa. Kaj ĉi-jare oni solenas la 150an jubileon pri la naskiĝo de tiu universala galego kaj la 80an datrevenon de lia morto. Neniu momento pli oportunus ol ĉi tiu por plenumi tian prezenton. Sed, krome, ni konsideris, ke ekster Esperantujo ni devas atesti pri nia ekzisto kaj ke la plej bona maniero tion fari estas pere de niaj kulturaj produktoj. Ni ja kreas propran kulturon kaj eksportas al la mondo hispanan kulturon en traduka formo. Sciigi tion al neesperantistoj ŝajnas al ni pli efika ol distamtami la “grandegan facilecon” de nia lingvo, kio, krom ke ĝi ne tute veras, apenaŭ altiras la atenton de la homoj. Nia kunulino Mati Montero jam de longe tion praktikas: ŝi senlace bataladas por la normaligo de la ĉeesto de Esperanto en la kultura vivo de Madrido. Dank’ al tio, en kelkaj el ĝiaj kulturaj medioj, ĉiam pli ni rigardatas ne kiel marsanoj, sed kiel unu el la multaj kultur-faraj kolektivoj de la hispana ĉefurbo. Mirinde, ĉu ne?

Tiukadre, MEL (Madrida Esperanto-Liceo) konsideris oportuna la proponon de Mati kaj financis la prezenton de *Bohemiaj lumoj* en Kubik Fabrik. Ĉi teatra salono posedas grandan scenejan spacon, sed ĝi estas konceptita por ne granda nombro da spektantoj. Por, proksimume, kvindek homoj. En la vespero de la 19a de marto, ĝi preskaŭ plenplenis. Kompreneble, ne mankis madridaj esperantistoj, sed videblis ne magra kvanto da neesperantistoj supozeble interesataj al niaj lingvo kaj kulturo.

En la unua parto de la aranĝo, mi enkonduke prezentis la verkon en la hispana. La atento de la publiko kaj ties entuziasma reago ĉe la fino kaptis min. En la dua parto, teamo de madridaj e-istoj: Jorge Camacho, Félix Lobo, Ana Manero, Mati Montero, Manolo Parra kaj mi mem, prezentis, unue en la hispana kaj tuj poste en Esperanto, aktoran voĉlegon de la Dekdua sceno de la verko. Kiel pozitive min surprizis miaj gekompanoj! Kia plezuro aktori kun ili! Kiel mi dankas ilin pro ilia kontribuo al la sukceso de la kultura vespero!... En la tria parto, ni starigis dialogon kun la publiko. Belis konstati la ĉeeston kaj la simpation al ni montratan de gravaj hispanaj kulturhomoj, kiel la poetino María Ángeles Maeso. Fine, mi subskribis ekzemplerojn de la libro. Krom unu el ili, oni vendis ĉiujn alportitajn de MEL, la organizo responsa pri la eldono. Menciindas, ke tiu eldono efektiviĝis kun la morala apogo kaj la teknika helpo de Libroservo de SATeH (fakte, de k-do Pedro Sanz, aŭtoro de la kompostado kaj de la kovrilo).

La opinioj ricevitaj pri nia kultura vespero estas kor-karesaj. Multaj el la ĉeestintaj neesperantistoj esprimis al ni sian bonan impreson pri nia seriozo, pri la kvazaŭprofesia flueco de nia tuta aranĝo, pri ties kulturaj alteco kaj intereso, pri la nesuspекtita beleco kaj natureco de nia lingvo... Al la oreloj de

eminenta hispana dramaturgo, kies nomon mi malkovros al vi aliokaze, alvenis eĥoj de nia prezentado, kaj li manifestis sian deziron konatiĝi kun mi, kio honoras ne nur min, sed ĉefe nian tutan teamon kaj Esperanton. Kultura agantino, kiu por la unua fojo aŭdis vortojn en nia lingvo, konfesis al mi sian raviĝon el nia tuta prezentado kaj sian deziron lerni tiun belegan lingvon, kiun ŝi ĝuis tiuokaze... Membroj de liberecana grupo de la kvartalo Carabanchel petis min ripeti mian enkondukon kadre de kulturaj renkontiĝoj okazontaj en ĝia sidejo, nomata EKO, en la monato majo... Nu, ĉio ĉi pravigas la trafecon de la veto fare de Mati kaj de MEL por nia elkatakombiĝo kaj por nia senkompleksa kaj senĝena agado sur la sama tereno, sur kiu disvolviĝas la hispanlingva kulturo en niaj urboj kaj vilaĝoj.

Juan del Castillo okupiĝis pri filmado de la tuto. María Zocato alŝutis la filmitan videaĵon al YouTube. Ĝi spektblas ĉe: [<https://youtu.be/fPE7d935pDE>]. La esperantistoj, kiuj preferas spekti nur la prezentadon de la Dekdua sceno de *Bohemiaj lumoj* en Esperanto, povas turni sin al: [[https://youtu.be/qGEoSgz\\_SxE](https://youtu.be/qGEoSgz_SxE)].

MIGUEL FERNÁNDEZ





## Tarifoj - 2017

	Baza kotizo	Baza kotizo (kun S-ulo nur perreta)	Abono al S-ulo (sen membreco)	Abono nur al perreta S-ulo (sen membreco)	
Argentino	24,00 €	15,00 €	18,00 €	9,00 €	Argentino
Aŭstralio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Aŭstralio
Aŭstrio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Aŭstrio
Barato	8,00 €	5,00 €	6,00 €	3,00 €	Barato
Belgio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Belgio
Bosnio-Hercegovino	12,00 €	7,50 €	9,00 €	4,50 €	Bosnio-Hercegovino
Brazilo	20,00 €	12,50 €	15,00 €	7,50 €	Brazilo
Britio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Britio
Bulgario	12,00 €	7,50 €	9,00 €	4,50 €	Bulgario
Ĉeĥio	24,00 €	15,00 €	18,00 €	9,00 €	Ĉeĥio
Ĉinio	8,00 €	5,00 €	6,00 €	3,00 €	Ĉinio
Danio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Danio
Estonio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Estonio
Finnlando	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Finnlando
Francio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Francio
Germanio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Germanio
Grekio	8,00 €	5,00 €	6,00 €	3,00 €	Grekio
Haitio	4,00 €	2,50 €	3,00 €	1,50 €	Haitio
Hispanio	40,00 €	25,00 €	30,00 €	15,00 €	Hispanio
Hungario	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Hungario
Irano	12,00 €	7,50 €	9,00 €	4,50 €	Irano
Israelo	36,00 €	22,50 €	27,00 €	13,50 €	Israelo
Islando	36,00 €	22,50 €	27,00 €	13,50 €	Islando
Italio	48,00 €	30,00 €	36,00 €	18,00 €	Italio
Japanio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Japanio
Kanado	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Kanado
Kolombio	12,00 €	7,50 €	9,00 €	4,50 €	Kolombio
Koreio	36,00 €	22,50 €	27,00 €	13,50 €	Koreio
Kroatio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Kroatio
Kubo	4,00 €	2,50 €	3,00 €	1,50 €	Kubo
Latvio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Latvio
Litovio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Litovio
Luksemburgio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Luksemburgio
Madagaskaro	4,00 €	2,50 €	3,00 €	1,50 €	Madagaskaro
Makedonio	12,00 €	7,50 €	9,00 €	4,50 €	Makedonio
Malio	4,00 €	2,50 €	3,00 €	1,50 €	Malio
Mongolio	8,00 €	5,00 €	6,00 €	3,00 €	Mongolio
Meksikio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Meksikio
Nederlando	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Nederlando
Norvegio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Norvegio
Pollando	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Pollando
Portugallio	28,00 €	17,50 €	21,00 €	10,50 €	Portugallio
Rumanio	12,00 €	7,50 €	9,00 €	4,50 €	Rumanio
Rusio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Rusio
Serbio	12,00 €	7,50 €	9,00 €	4,50 €	Serbio
Slovakio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Slovakio
Slovenio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Slovenio
Svedio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Svedio
Svisio	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Svisio
Tajvano	32,00 €	20,00 €	24,00 €	12,00 €	Tajvano
Turkio	16,00 €	10,00 €	12,00 €	6,00 €	Turkio
Ukrainio	8,00 €	5,00 €	6,00 €	3,00 €	Ukrainio
Usono	52,00 €	32,50 €	39,00 €	19,50 €	Usono

## Alternativaj pagoj per loka valuto

Britio	40,00 GBP	25,00 GBP	30,00 GBP	15,00 GBP	Britio
Ĉinio	56,00 CNY	35,00 CNY	42,00 CNY	21,00 CNY	Ĉinio
Japanio	6.960 JPY	4.350 JPY	5.220 JPY	2.610 JPY	Japanio
Kanado	80,00 CAD	50,00 CAD	60,00 CAD	30,00 CAD	Kanado
Kroatio	120,00 HRK	75,00 HRK	90,00 HRK	45,00 HRK	Kroatio
Svisio	64,00 CHF	40,00 CHF	48,00 CHF	24,00 CHF	Svisio
Tajvano	1.160 TWD	725 TWD	870 TWD	435 TWD	Tajvano
Turkio	52,00 TRY	32,50 TRY	39,00 TRY	19,50 TRY	Turkio
Usono	64,00 USD	40,00 USD	48,00 USD	24,00 USD	Usono
	<b>Baza kotizo</b>	<b>Baza kotizo (kun S-ulo nur perreta)</b>	<b>Abono al S-ulo (sen membreco)</b>	<b>Abono nur al perreta S-ulo (sen membreco)</b>	

# LANDAJ PERANTOJ

## Aŭstralio – Franciska Toubale

1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio  
rete : fran14@bigpond.net.au

## Belgio – Claude Gladly

Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE  
Tel-Fakso-Respondejo : 00-32- (0)71 644916

Rete : cgladly@arcadis.be

Bankkonto : 750-6373051-18

IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22

## Bosnio-Hercegovino – Ivica Horvat

Žrtava faŝizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino  
rete : ivica.h@hs-hkb.ba

## Brazilio – José Joaquín Lunazzi

R. Manoel Antunes Novo, 668, BR-13084-157  
Campinas-SP., Brazilio

rete : lunazzi@esperanto.cc

## Britio – Arturo Prent

7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio  
tel. : +44.1.277.22.89.62

Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"

Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003

BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003

rete : ap\_esp-sat21@yahoo.co.uk

## Bulgario – Metodi Markov

Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario

tel. (fiksa): +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403

rete: mam1948@abv.bg

IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF

## Ĉeĥio – Václav Stibůrek

J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio

tel.: +420.737230231, rete: stiburek.v@seznam.cz

IBAN: CZ662010000002900048738

BIC/SWIFT: FIOBCZPPXXX

## Ĉinio – BRUNO GUY CLAUDE HENRY

rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr

Bankkonto N°6217857500009246684

SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970

BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong

Road (M) CHANGSHA - HUNAN - ĈINIO

## Danio – HENRIKSEN Kim

Hallandsgade 6; DK-2300 COPENHAGEN

rete: kimjezus@gmail.com

## Francio – Barthélémy Maurau

Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE

FR-27000 EVREUX, Francio

rete: barthelemy.maurau@free.fr

Bankkonto: 1733310 N 020

IBAN: FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070

BIC: PSSTFRPPPAR

## Germanio – Dominik Schramm

Möhringer Straße 43, DE-70199 Stuttgart, GERMANIO

rete : dominik.schramm@gmx.net

senpagaj internaciaj ĝiroj eblas rekte al la konto "SAT" ĉe

"La Banque Postale, Paris" :

IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC : PSSTFRPPPAR

## Hispanio – Pedro Maria Sanz Sanz

C/Mar de Fora 13, esc.izqda., 3-B, ES-28400 Collado

Villalba, Hispanio

rete : pedrosanzsat@gmail.com

Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)

IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726

BIC: BBVAESMM

## Hungario – Tóth Zsolt

Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario

Tel: +36-20-5188919, rete: zstoth75@gmail.com

Bankkonto: 11773377-00000354

IBAN: HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000

BIC: OTPVHUHB

## Italio – Carlo Bourlot

Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO), Italio

rete : carlo.bourlot@gmail.com

Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993

Poŝtkonto : n-ro 43976158

Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,

Kodo BIC : BPPIIRXXXX

## Izraelio – Jehoŝua Tilleman

97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio

rete : b48705544@013.net

## Japanio – Nakamura Daiŝin

Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo

rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com

Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon

## Koreio – Jung Hyunsoo (Paz)

Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu

KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do

rete : paze23@gmail.com

## Kroatio – Ivica Šćepanović (Truto)-poŝte

Otok Brac, HR-21414 Gornji Humac, Kroatio

Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07

rete: ivica.scepjanovic1@st.t-com.hr

Poŝtkonto: 3200129804 Splitska banka

IBAN: HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC: SOGEHR22

## Litovio – Gražina Opulskienė

Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio

Tel: +37068736457, rete: grazopul@yahoo.com

Bankkonto: LT347300010001720030

BIC/SWIFT kodo: HABALT22, Swedbank

## Malagasio – Justine (Lala) Ralalarisoa

Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101

Antananarivo, Malagasio

rete : llrespr@libero.it

IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112

BIC: BMOIMGMG

## Norvegio – Cécile Anda

Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio

## Portugalo – Manuel Luis Pedrosa Alves

Estrada Principal, 79, Morelino, PT-2710 Sintra, Portugalio

rete: morelino\_sintra@hotmail.com

## Rusio – Nikolao Gudskov

a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio

rete : nikolao@orc.ru

## Svedio – Inga Johanson

Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio

rete : ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com

Poŝtkonto: Svenska arbetesperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8

IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608

BIC: NDEASESS

## Svisio – Richard Schneller

Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio

rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1

## Tajvano – CHO Chaoming

12F2, No. 41, Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung

rete : cmcho@so-net.net.tw

## Ukrainio – Andreo JANKOVSKIJ

str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio

rete : classes@bigmir.net, telefono : 380 67 99 470 03

## Usono – Brandon SOWERS

PO Box 52731, Atlanta, GA, 30355, Usono

nigrakajrgxa@gmail.com

Sendu ĉekojn al la indikita adreso

## Aliaj landoj

SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio

rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org

rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org

Tel: (+33) 09 53 50 99 58

Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA: satx-s

aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

## Sennaciulo

Oficiala organo de SAT

## Asocio sidejo de SAT

67 avenue Gambetta,

FR-75020 Paris, Francio

Retadreso: kontakto@satesperanto.org

Retejo: http://satesperanto.org

Tel: (+33) 09 53 50 99 58

Poŝtkonto:

SAT n°1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

## Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo

Sekretario: Diana Riŝar

Kasisto: Bruno Henry

Membroj: Guy Cavalier, Franjo Martin, Pedro Sanz,

Dominiko Simeone

## Sennaciulo

Redaktoskipaj kunordigantoj: Vinko Markovo, Pedro Sanz

Enpagiganto: Nicolas Raymond

Ceteraj redaktantoj: Djénil Kessous, Gary Mickle, Grazina

Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo

Sir' kaj Franciska Toubale.

Kontribuojn sendu elektronike al:

sennaciulo.redaktejo@gmail.com

aŭ paperpoŝte al

SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,

FR-75013 Paris, Francio

Pri financaĵoj sendu al:

financoj@satesperanto.org

Libromendojn sendu al:

libroservo@sat-amikaro.org

Librajn eldonproponojn sendu al:

pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

Imprimé par/Presita de:

TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas dumonate - Bimestriel.

Directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono:

France 39 €

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la

SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution:

N° CPPAP 05 20 G 86567

> Por la nemenciitaj landoj la aliĝo al SAT estas 5 € kaj la PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/si ricevas Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo

> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/si ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

> Pagante 75 % de la plena kotizo por la koncerna lando, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> La kotizo estas pagenda al: poŝtkonto n-ro 1234-22 K Paris, aŭ la landa peranto de via regiono.

## KOTIZOJ 2016

Lando	Jarkotizo	Lando	Jarkotizo
Argentino	27 €	Japanio	7000 JPY
Aŭstralio	52 €	Kanado	81 CAD
Aŭstrio	52 €	Koreio	33 €
Barato	12 €	Kroatio	12 € (90 HRK)
Belgio	52 €	Latvio	12 €
Bosnio-Herc.	10 €	Litovio	12 €
Brazilio	22 €	Malagasio	5 €
Britio	45 GBP	Makedonio	5 €
Bulgario	12 €	Malio	5 €
Ĉeĥio	20 €	Mongolio	12 €
Ĉinio	45 CNY	Meksikio	15 €
Danio	52 €	Nederlando	52 €
Estonio	12 €	Norvegio	52 €
Finnlando	52 €	Pollando	12 €
Francio	52 €	Portugalo	30 €
Germanio	52 €	Rusio	12 €
Grekio	5 €	Serbio	12 €
Haitio	5 €	Slovakio	12 €
Hispanio	40 €	Slovenio	12 €
Hungario	12 €	Svedio	52 €
Israelo	32 €	Svisio	79 CHF
Islando	33 €	Ukrainio	12 €
Italio	50 €	Usono	74 USD

DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €

34 | Sennaciulo | SEPTEMBRO – OKTOBRO 2016

## NOVAJ ALIĜOJ

36070 CAPPÀ Giulio IT 11100 AOSTO Italio  
36071 METZGER Michel FR 81500 GARRIGUES Francio



Parolado far nuntempa Sokrato, p. 17



Prezento de *Bohemiaj lumoj* en madrida teatro, p. 32



Blanka malriĉeco, p. 16



Striko de la rezinistoj, p. 25



Pri atomruboj, p. 30



**LA 89-a SAT-KONGRESO EN HERZBERG am HARZ - SIEBER 16. - 23. 7. 2016**

